

Rusio: bridi la monstron

32a jarkolekto - oktobro 2011/10

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijs - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

Norvegio: floroj, ne armiloj

Nov-Zelando:
tremoj teraj, financaj, politikaj


Aŭstrio:
forpasas „granda eŭropano”

Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj

Lidia Zamenhof

La kompleta verkaro de Lidia Zamenhof, kompilita de Jean Amoureux, Zofia Banet-Fornalowa, Masayosi Higasida kaj Bernhard Westerhoff, kun antaŭparolo de Louis Christophe Zaleski-Zamenhof.

La vivon de Lidia Zamenhof, plej juna el la tri Zamenhof-infanoj, stampis la du mond-militoj. La unuan ŝi travivis adoleske kaj dum la dua ŝi pereis koncentre. Ŝiaj en tiu ĉi volumo kolektitaj artikoloj, paroladoj kaj fikciaj verkoj pentras unikan bildon de la periodo intermilita. Ili sumigas al granda, arda prediko por la esperantistojn savi kaj mobilizi. Ŝi volis ilin savi de la regantaj naziismo, rasismo kaj aliaj materiismaj ideologioj. Kaj ŝi sopiris vidi ilin fermenti la venon de paca kaj justa estonteco pri kiu revis ŝia patro kaj kiun profetis ŝia religio.



Eldonjaro: 2009


Tradicia bindita versio: formato 135 x 205 mm, 430 paĝoj,
ISBN: 978-90-77066-38-6;
prezo ĉe FEL: 24 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 14,40 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

11



Forpasas „granda eŭropano”

En Vieno estas enterigita Otto von Habsburg, la plej aĝa filo de la lasta imperiestro de Aŭstrio-Hungario Karl la 1a. Li forpasis la 4an de julio en Pöcking (Germanio) en aĝo de 98 jaroj.

Norvegio: floroj, ne armiloj

14

Je 15:26 iuj oslanoj troviĝis en la urbocentro, aliaj kelkajn kilometrojn for, sed preskaŭ ĉiuj aŭdis la tondran eksplodon. Bonŝance estis feria tempo kaj vendrede posttagmeze. Tial nur kelkaj estis transirantaj la placon inter la registaraj domegoj aŭ laboris en ties teretaĝo. El tiuj ok mortis.

Tra la tuta lando ĉiuj enŝaltis radio-aparaton, vidis bildojn en interreto, legis raportojn, rigardadis televidon. Je 17:30 raportigis ankaŭ pri pafado en Utøya – insulo, kie okazis la ĉiusomera junulara tendaro de la laborista (socialdemokrata) partio. Ĉu ia rilato inter la du atencoj? oni demandis sin.

Eŭropo en la fajro de la epidemio

Mia artikolo Nova infekta malsano postulanta internacian kunlaboron (MONATO 2001/5, p. 17) (havebla interrete) priskribis malsanon, kaŭzitan de la enterohemoragiaj tipoj de intestaj bakterioj Escherichia coli. Tiu artikolo denove aktualas pro la ĉi-jara vasta epidemio de tiu malsano en Germanio kaj en multaj aliaj landoj de Eŭropo. Tial mi rememorigu iom pri la malsano kaj la kulpaj bakterioj.



22

politiko

NIĜERIO	8
Bomboj kaj mortoj: la lingvo de islama radikalismo	
ALBANIO	8
Voĉoj de kianto en elekto-dezerto	
KIPRO	9
„Eksplodas” popola kolero	
NEPALO	9
Diversdirekten tirata	
RUSIO	10
Bridi la monstron	
AŬSTRIO	11
Forpasas “granda eŭropano”	
NOV-ZELANDO	12
Tremoj teraj, financaj, politikaj	
KOSOVO-TURKIO	13
Lernolibroj „ofendaj”	
NORVEGIO	14
Floroj, ne armiloj	

moderna vivo

RECIKLIGO	16
Perspektivoj el rubujo	
GREKIO	18
Malantaŭ la montrofenestro	
VALUTOJ	18
Kupono-mono	
FERVOJOJ	18
Rapida kunligo	
DANIO	19
Senrajtulaj sanrajtoj	
ARKEOLOGIO	19
Rubo de la romianoj	

ekonomio

LITOVIO	20
Eŭro daŭre allogas	
ENERGIO	21
Ĉu nukleaj centraloj necesas?	
INTERNACIAJ FINANCOJ	21
Magraj jaroj	

scienco

BAKTERIOJ : Eŭropo en la fajro de la epidemio	22
FIZIKO : Lumrapida komunikado	23

novelo

La ultradimensio	24
------------------------	----

libroj

Kristanisma pia libreto	26
Pri lingvo ne universala, ne el Krotelo, ne por Barato kaj nepre sen iksoj	26

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

► Rekto al la eldonoj ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakte al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be.
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Bosnio-Herc.	BAM	50	55	30	11	18
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	25	28	15	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	67
Estonio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Grekio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hispanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hungario	HUF	8100	8900	4860	1530	2500
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Latvio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Litovio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalia	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	25	28	15	5,5	9
Slovakio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Slovenio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	85
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, 4/23 Albuera Street, Battery Point Tas 7004, Australia. Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: aon.913548977@aon.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Bosnia kaj hercegovina:** Esperanto-Ligo, Kralja Tvrtka 19 (Pf. 452), 71000 Sarajevo. Konto: 338-900-220-635-2698. Reto: info@esperanto.ba.
- > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi.
- > **Francia:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
 - > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 - > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
 - > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 - > **Hungara:** AbonaSoft Bt, HU-1093 Budapest, Bakáts u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
 - > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
 - > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
 - > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: fesp.it@infinito.it.
 - > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.
 - > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca.
 - > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860. Rete: esperanto@saluton.net.
 - > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 606-1250,

- Escáz. Reto: miaumiau@ice.co.cr.
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr.
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: wickler.albert@gmx.net.
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City 0630. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
 - > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-grad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljković 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.rs.
 - > **Slovaka:** Stano Marček, Zvolenská 15/11, SK-3601 Martin. Reto: marcek@esperanto.sk.
 - > **Slovenaj:**
 - > Višnja Branković, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: visnja.brancovic@os.hinet.hr.
 - > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr.
 - > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
 - > **Svedaj:**
 - > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
 - > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org.

Scienco

Komence de la jaro Thomas Eccardt demisiis kiel redaktoro de la rubriko „Scienco” de MONATO. Dum kelkaj semajnoj la ĉefredaktoro kaj la redakcia sekretario serĉis posteulon, kaj el kvar kandidatoj fine estis elektita Krys Williams. Aŭ ĉu ni diru „reelektita”? Efektive Krys jam en la periodo 1992-1998 tre taŭge plenumis la saman funkcion (tiam sub la nomo Krys Ungar) kaj tiu fakto sendube influis ŝian elekton.

Post nombraj vivoŝtormoj kaj personaj tragedioj en la lastaj dudek jaroj, Krys komencis novan vivon en la eta komunumo de Treorci [treorki] en Rhondda [ronda], Sud-Kimrio. Ju pli ŝi mergiĝas en „kimrecon”, des pli da ĝojo reeniras la vivon. La leĝa nomoŝanĝo al Williams esprimas la fakton, ke Krys proklamas sin kimro pro mem-elekto, ago kiu tute ne

unikas al ŝia kazo! Krom lerni la kimran lingvon kaj provi uzi ĝin kiam ajn eblas (ne tro ofte en Sud-Kimrio bedaŭrinde), Krys esploras la tradician muzikon de la lando, kaj lastatempe fariĝis la sekretariino de la loka branĉo de la kimra nacia partio *Plaid Cymru* [plajd kamri].

Por gajni la panon, Krys laboras kiel sendependa tradukisto de dokumentoj en la medicina fako, tradukante el la pola, serba, kroata, slovena, franca, germana kaj hispana lingvoj en la anglan. Cetere, ŝi fojfoje indeksas librojn (anglajn) en diversaj fakoj.

Aktuale, Krys dividas sian eksminististan dometon kun kvar nigraj katoj. Kiam la tempo permesas, krom partopreni en kimraj aferoj ŝi ĝuas legi pri la antikva Egiptio, verki artikolojn por diversaj retpaĝaroj kiel *Hubpages*, ludi violonon kaj kanti kun grupo *Immanuel's Ground* en War-

wick, kaj serĉi „trezoron” pere de geokaŝado. Diverskiale, Krys kabeis dum multaj jaroj kaj iom surpriziĝas, ke MONATO deziras ŝian kunlaboron denove. Kelkfoje tamen ŝi babilas Esperantlingve ĉe *esperanto-krys.blogspot.com* kaj eble babilos pli ofte en la estonto.

La tuta skipo de MONATO deziras al ŝi sukceson en ŝia (re)nova tasko!

Sincere via



Paŭl Peeraerts



Krys Williams estis reelektita kiel redaktoro pri sciencaj temoj.



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 32a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: info@fel.esperanto.be, Skypetelefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

sociaj retejoj:

- Twitter: @FEL_Antverpeno
- Facebook: <http://eo-eo.facebook.com/revuo.Monato>
- Ipernity: http://flandra_esperantoligo.ipernity.com

honora ĉefredaktoro:

Stefan Maul.

ĉefredaktoro:

Paul Gubbins, 3 Arden Court, Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Rob Moerbeek, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

teknika redaktoro:

Christina Schwarzenstein

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

- Arto: Claude Nourmont-Moon, 2 Om

Klappchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

- **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono. Telefono 440-646-1482. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

- **Lingvo:** Andy Peetermans, Schaliehoevestraat 23, B-2220 Heist-op-den-Berg

Rete: lingvo@monato.net.

- **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario. Rete: medio@monato.net.

- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

- **Noveloj kaj Poezio:** sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: noveloj@monato.net.

- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

- **Scienco:** Krys Williams, 95 Tynbedw Terrace, Treorci, RCT CF42 6RL, Britio. Rete: scienco@monato.net.

- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net.

- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Mikspoto redakta

Unu el la frazoj en mia artikoleto *Mikspoto politika* (MONATO 2011/7, p. 9) estis miskorektita. Originale mi skribis: „La partio pretendas apogi Esperanton ... kio ne tre ‘karigus’ [= angle *would endeavor*; france *rendrait chère*] la zamenhofan lingvon al la irlanda publiko.” Post redaktado ĝi aperis kiel: „kio ne tre klarigus ktp”. Eble la nomita partio ja bone scipovus klarigi Esperanton al la publiko, sed, pro ties politiko (rigardata kiel ekstremisma), ĝi eble ne allogos irlandanojn al la lingvo. Tion mi celis.

Garvan Makaj
Irlando

Kiu tradukis?

Mi ĵus legis en MONATO 2011/7 (p. 24-25) la recenzon de Nikolao Gudskov pri la verko de Michel Onfray *Traktaĵo pri ateologio*. Mi ne volas polemiki pri la vidpunkto de la recenzinto. Sed traduki tian libron ne estas facila laboro, kaj mirigas min, ke ne aperis la nomo de nia eminenta esperantista amiko, kiu plenumis tiun taskon, Paul Signoret.

Jacques Ravary
Francio

Albanoj ŝokitaj

La senprecedencaj krimegoj en Norvegio en la lasta semajno de julio ŝokis ankaŭ albanojn, interalie ankaŭ pro tio, ke la 1500-paĝa manifesto de la krimulo mencias kelkdekojn da fojoj ankaŭ albanojn. Li defendas serbojn ekde la printempo 1999, kiam NATO komencis siajn bombardojn por devigi la faŝistan reĝimon de Milošević ĉesigi la amasan deportadon kaj genocidon de miliono da etnaj albanoj en Kosovo. Li subtenas grekojn, kiuj deportadis 25 000 etnajn islamajn albanojn el la regiono de Ĉamerio junio 1944. Li malamas albanojn loĝantajn en siaj propraj teroj en Albanio, Kosovo, Makedonio, pro la fakto ke la plimulto el ili estas islamaj. Sed li ne akceptas la fakton, ke albanoj estas popolo ne fanatikema, ke ili amas kaj subtenas la aliĝon al EU eĉ pli ol mem norvegoj.

Bardhyl Selimi
Albanio

Matena kafo

Kun intereso kaj ĝuo mi legis la rakonton de Daniel Mason *Matena kafo* (MONATO 2011/8-9, p. 35-38). Mi deziras gratuli la aŭtoron pro liaj atingoj – pre-

cipe la stilaj – kaj esprimi la esperon, ke baldaŭ MONATO povos denove proponi al siaj legantoj similan frandaĵon!

Andreo Peetermans
Belgio

Matena kafo (2)

Ravis min la ĉarma rakonto de Daniel L. Mason *Matena kafo*. Mi eĉ emus republikigi ĝin en la sekva eldono de *Vojaĝo en Esperanto-lando*.

Boris Kolker
Usono

Skistogasa koŝmaro!

Litovio revas pri skistogaso (MONATO 2011/8-9, p. 22-23). Prefere ĝi parolu pri koŝmaro! Por ekspluati skistogason laŭ la nuna teknologio, necesas koktelo de pli ol 500 kemiaĵoj kaj miloj da litroj da akvo. Evidente la tuto retroviĝas en la aero kaj en la riveroj kaj poluas la aeron kaj la grundon. Malsaniĝas homoj kaj bestoj, kiuj manĝas kaj trinkas venenitajn nutraĵojn pro la rubaj restaĵoj. Se ne paroli pri la malbelaspektaj putoj, kiuj difektas belajn kamparajn pejzaĝojn ... Tiu koŝmaro jam trafas Usonon, ni do havas bildigitan ekzemplon de la sekvoj. La trafitaj homoj ricevas monon por silenti ...

En la suda Francio homoj mobiliziĝis de la 26a ĝis la 28a de aŭgusto por protesti, sed ankaŭ por informi la publikon. Prefere al ekspluatado de skistogaso, ni uzu sunan, aeran kaj akvan energiojn, kiuj pli respektas la medion, kaj ni malpligrandigu niajn bezonojn!

Renée Triolle
Francio



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigas vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe
MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,
Belgio aŭ rete ĉe **monato@fel.esperanto.be**.

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO.

Leteroj por publikigo estu senditaj al **leteroj@monato.net** aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Malstulta sezono

Paul GUBBINS

Kiam vi legos ĉi tiujn vortojn, estos finiĝinta la tiel nomata stulta sezono. „Stulta sezono” nomas ĵurnalistoj – almenaŭ en Britio – la periodon, ĝenerale en aŭgusto, kiam mankas novaĵoj. Mankas, en la senco, ke gravuloj, tiuj, kiuj „kreas” la novaĵojn, do politikistoj, urbestroj, grandaj entreprenistoj ks ferias, kaj do – feliĉe, eble – silentas.

Tiam plenas ĵurnaloj, radio-programoj, per „stultaj”, do malpli seriozaj raportoj. Tertremeto: Arbo falinta. Esploristoj konstatas: Suĉu la piedfingrojn de via partnero por feliĉi/sveltiĝi/eviti kanceron/prosperi en via kariero. Marsanoj vizitas la teron por forigi nuklean rubaĵon (ĉi lastan mi ne inventis: mi trovis en leganto-letero en mia loka ĵurnalo).

Tamen la ĉi-jara stulta sezono, malgraŭ marsanoj, montriĝis oble pli malstulta ol en la pasinteco. Ter-globe dominis novaj-bultenojn la ekonomia krizo. Usono estis ekperdonta sian kapablon salajri milionojn da ŝtatoficistoj, subvencii siajn plej malriĉajn civitanojn. Fakte ĝi ja perdis sian prestiĝan ekonomian rangon tri-oble-A, dum ĝia prezidanto, teorie la plej potenca homo en la mondo, staris senpova, senhelpa, meze de kontraŭaj kaj konfliktaj opinioj.

En Eŭropo cirkuladis duboj pri la financa stato ne nur de Grekio kaj Irlando, sed ankaŭ de Hispanio, Portugalio, Italio, kaj aliaj landoj. La stabileco, eĉ la estonteco, de la eŭropa valuto, la eŭro, estis vaste diskutata. Politikistoj interrompis siajn feriojn por mesaĝi unu al la alia pri la krizo, ŝajnigante decidemon, kapablon, influon – sed reale submetitaj al la kapricoj de la mon-merkatoj, kun kiuj ili, aŭ almenaŭ iliaj antaŭuloj, ĝis antaŭ nelonge kunkonspiris.

En Britio videblis sur la stratoj de

Londono, kaj aliaj anglaj urboj, tumultantaj homamasoj, brulantaj aŭtoj, prirabataj vendejoj. Pli da urba detruado, notis komentistoj, ol iam ajn de post la dua mondmilito. Junaj homoj, ĝenerale sub la aĝo de 25 jaroj, precipe sen laboro, sed kelkaj kun, ankaŭ infanoj, apenaŭ 10-jaraĝaj, kaptiĝis en YouTube-filmetoj, elirantaj el magazenoj kun, subbrake, televidiloj, sportŝuoj, ĝinzoj, cigaredoj. Nerveze alrigardis policianoj, tro malmultnombraj por ĉiam interveni.

Ĉio komenciĝis, ŝajne, kiam policanoj mortpafis en taksio iun, kiun ili suspektis pri ... nu, kio? Rondiris onidiro post onidiro. Kolektiĝis homoj antaŭ policejo, avertite per *Blackberry*, pe-tante informojn, klarigojn. Nenio. Kolere, ili surstratiĝis ... kaj jen preteksto, baldaŭ forgesita, por orgio de civila malobeo, tumultado, krimado.

Kirliĝis kulpigoj. Dekstruloj: kulpas la gepatroj, la lernejoj, religio-manko, respekto-manko – ankaŭ la polico. Maldekstruloj: kulpas la registaro, ĝia ŝpar-politiko – tranĉitaj estas sociaj servoj, eĉ la polica buĝeto. Sociologoj: kulpas la socio, senlaboro, manko de mono, bonaj hejmoj, solgepatraj familioj, reklamoj pri vivstilo, kiun ne-

niam laŭleĝe atingos gejunuloj sen kvalifikoj, sen espero. Eksterlandanoj (ekzemple francoj, kiuj mem en 2005 vidis similajn scenojn): kulpas la t.n. anglosaksa (alivorte usona) kapitalisma modelo.

Trafe resumis la situacion 18-jaraĝa Chavez Campbell [ĉaves kambel], bok-sisto. „La registaro estus devinta anticipi la tumultojn. Mankas laboro kaj, kiam ja prezentas sin laborloko, ne ricevas ĝin junulo. Estas nenio por fari, oni fermas la junularo-klubojn, do la stratoj freneziĝas. Ili plenplenas je homoj aŭ sen ambicioj aŭ ja kun, sed sen ebloj ilin realigi.”

Parlamentanoj, kiuj antaŭ nelonge „prirabis” la publikon, skandale ricevante el popola poŝto monon kontraŭ privataj elspezoj, kondamnis tiujn, kiuj publike prirabis. Kaj, kiam bankistoj „prirabas” siajn firmaojn, subvenciajn post la ekonomia krizo de 2008 de la ŝtato (t.e. de impostpagantoj), kaj pagas al si enormajn salajrojn, pensiojn ktp, oni nomas tion meritita kromsalajro. Kiam senlaboraj gejunuloj same sin servas, oni nomas tion krimado, tiel ke sekvas monpunoj kaj enkarcerigoj.

Unu regularo por riĉuloj, unu por malriĉuloj: tio ne novas. Tamen la kolero, la detruemo, la frustracio de elementoj en la subaj tavoloj de la socio, ja novas. Nenio, tamen, ŝanĝiĝos, ĝis kontistoj – taskataj etskale, firmaonivele maksimumigi profitojn – komprenos, ke fermi enlandan fabrikon, elporti eksterlanden la laboron, povos egskale, landnivele, estigi ne nur subklasojn da ekskludataj, senestontecaj hometoj sed ankaŭ – pli grave – socian malprofiton. ■



Londona strato post maltrankvilaj tagoj...

Bomboj kaj mortoj: la lingvo de islama radikalismo

Niĝerio fariĝis unu el la landoj en la mondo batalantaj kontraŭ terorismo. Aparte la norda Niĝerio ne plu estas sekura: al sudaj niĝerianoj tie loĝantaj oni konsilas reveni hejmen.

Radikala islama grupo, Boko Haram, deklaris militon kontraŭ la niĝeria ŝtato. Ĉiutage estas mortpafataj dekoj da homoj, ĉefe policianoj kaj membroj de la sekurecaj servoj. Krome estas detruataj publikaj konstruaĵoj.

Boko Haram insistas pri rigora aplikado en la norda Niĝerio de la islama leĝaro. Ĝi kontraŭas ĉion okcidentan, inkluzive de edukado de knabinoj. Ĝi batalas kontraŭ ajna miksiĝo de islama-anoj kaj alireligianoj, precipe kristanoj.

Bomboj

Niĝerio, dividita inter la islama nordo kaj la alireligia, kristana sudo, suferis diversajn atakojn kaj atencojn. En junio Boko Haram eksplodigis bombojn ĉe la sidejo de la niĝeria polico, kies inspektoro-generalo tien ĵus revenis. Mortis laŭ oficialaj raportoj ok homoj, sed multaj opinias, ke plias la nombro de viktimoj. Detruitaj estis 33 veturiloj.

Kelkajn tagojn poste eksplodis alia bombo en parko kaj drinkejo: mortis 10 homoj kaj estis vunditaj dekoj pli. Sekvis aliaj atencoj ĉe drinkejoj.

La registaro taksas serioza la agadon de la terorisma grupo. La estro de la niĝeria armeo, generalo Azubuike

Iherijika, deklaris militon kontraŭ ĝi. Tamen la vortoj estas sensignifaj. Boko Haram ne timas la registaron kaj, pro la malalta eduko-nivelo en la nordo, daŭre altiras adeptojn.

Hoteloj

Por pli efike kontraŭi la terorismon, la instancoj en la ĉefurbo anoncis, ke ĝi limigos la moviĝadon de civitanoj. Hoteloj, drinkejoj, manĝejoj, diskotekoj k.s. nepre devas fermi siajn pordon je la 10a vespere. Malpermesite estas lasi aŭton apud publikaj domoj aŭ registaraj oficejoj.

Tamen multaj opinias, ke pro korupto niĝeriaj sekurecaj servoj ne kapablas protekti kontraŭ terorismo. Civitanoj nun antaŭvidas, ke terorismo fariĝos parto de la ĉiutaga vivo en lando iam konata pro paco kaj sereneco.

Princo Henriko OGUINYE

Voĉoj de krianto en elekto-dezerto

Jam de 20 jaroj ne okazas tiel forta batalo inter la urbestro-kandidatoj en la albana ĉefurbo Tirano.

Unuflanke, alianco de socialistoj kun ĉekape Edvin Rama, pentristo, jam trifoja urbestro; aliflanke, alianco de demokratoj kun ĉekape Lulzim Basha, juristo, plurfoje ministro. Ambaŭ proponis allogajn, interesajn programojn.

La popolo rigardis en televido, aŭ sur grandaj publikaj ekranoj, kiel nombrado de la voĉoj en la diversaj balotilujoj indikas jen venkon por unu, jen venkon por alia. Fine estis anoncite, ke venkis

Rama per 10 voĉoj (en urbo kun ĉirkaŭ 800 000 loĝantoj).

Ludreguloj

Tamen oni konstatis, ke pluraj balotiloj estas erare metitaj en malĝustajn kestojn. La demokrata kandidato postulis, ke estu enkalkulitaj ankaŭ tiuj voĉoj. Vane protestis la socialistoj, ke estas subite ŝanĝitaj la ludreguloj.

Du semajnojn poste deklaris la Centra Elekta Komisiono, ke, surbaze de la mislokigitaj balotiloj, fakte venkis per 84 voĉoj Basha. Denove plendis la so-



*Nur manpleno da voĉoj fine determinis, kiu venkis:
Lulzim Basha aŭ
Edvin Rama.*

cialistoj, insistante, ke la komisiono kontrolu la voĉojn en ĉiuj 1800 balotilujoj de la ĉefurbo.

Ĉi-foje superis Basha per 93 voĉoj. Socialistoj postulis novajn elektojn, sed kortumo tion malpermesis. Tiel, dum la venontaj kvar jaroj, Lulzim Basha urbestros en Tirano.

Bardhyl SELIMI

„Eksplodas” popola kolero

Gravaj kaj diletantecaj eraroj flanke de la kipro registaro kondukis en julio al la plej granda eksplodo okazinta en la lando.

En 2009, obeante al internaciaj direktivoj, Kipro konfiskis el irana ŝipo eksplodaĵojn survoje al Sirio. Kaj Britio kaj Usono plurfoje proponis transloki la eksplodaĵojn en senriskan ejon, ekzemple militbazon.

Kipro, tamen, preferis trovi enlandan deponejon por ne difekti la rilatojn kun Sirio, kaj igi ĝin agnoski la suverenecon de la turk-kipra areo, ĝis nun internacie agnoskita nur de Turkio.

Elektraj centraloj

Tial dum preskaŭ tri jaroj la kipraj aŭtoritatoj gardis la eksplodaĵojn en malgranda vilaĝo, Mari, inter Limasolo kaj Larnako. Taŭga elekto, eble, se la ejo ne situus ene de ŝipa bazo kaj proksime al tri grandaj elektraj centraloj kaj vasta

deponejo de dizela brulaĵo.

Ĉi tie la eksplodaĵoj estis konservataj en 98 konteneroj stakigitaj unu sur la alia kaj elmetataj somere al granda varmo. Jam okazis etaj eksplodoj kaj incendioj, sed la registaro ne atentis la avertosignalojn. Junaj soldatoj estis taskataj „akvumi” la kontenerojn kaj ilin malvarmigi.

Korpopartoj

La 11an de julio tiu ĉi „prokrasta bombo” eksplodis. Pereis 12 homoj kaj, pro la forto de la eksplodo, eblis enterigi nur korpopartojn de la viktimoj. La kratero profundis ekvivalente de sep etaĝoj. En kvin-kilometra ĉirkaŭaĵo estas difektitaj hejmoj kaj aŭtoj: oni kredis, ke okazis tertremo.

Fortan damaĝon suferis unu el la elektrocentraloj: rezulte dum ses monatoj en la tuta lando estos ĉiutagaj duhoraj mallumigoj. Tio siavice kaŭzas familiajn

kaj industriajn ĝenojn.

Defilado

La akcidento indignigis la kipran loĝantaron. Miloĝoj da homoj, ĉefe junuloj, organizis defiladon, petante, ke la prezidanto Christofias kaj ties ministroj demisiu pro la senrespondeca mastromado de la konfiskaĵoj.

Alveninte ekster la prezidanta palaco, ili klopodis eniri, sed estis forpelataj pro larmiga gaso. La kulpoj de la registaro estas evidentaj, tamen la prezidanto (kies pozicio estis jam malfirma pro aliaj etaj skandaloj) asertis, ke li nenion sciis pri la eksplodaĵoj.

Christofias, por provi kontentigi la popolon, demisiigis du ministrojn. Tio kreskigis publikan koleron, kaj oni postulis la falon de pliaj kapoj – ĉefe tiun de prezidanto ne plu fidinda.

Roberto PIGRO

NEPALO

Diversdirekten tirata

En Nepalo politikistoj promesas kaj promesas kaj poste forgesas tion, kion ili promesis. Elektitaj estas tiuj, kiuj pleje promesas – sed intertempe la popolo restas senhelpa.

En la pasinteco oni fidis la reĝon. Sed ribeluloj eligis en 2008 la reĝon, kaj poste nova ĉefministro ŝveligis al pli ol 600 seĝoj la parlamenton, kiu nur sporene ene de tri jaroj kunvenis.

Post la forigo de la reĝo estis elektita kiel ĉefministro la estro de la ribeluloj,

Pushpa Kamal Dahal, alinome *Prachanda* („feroca”). Li promesis novan konstitucion, kiu neniam aperis.

Timas

En la lastaj elektoj homoj kredis, ke la ribeluloj batalos por la popolo. Aliaj timis la ribelulojn. Prachanda scipovas silentigi multajn kontraŭulojn, kaj nun oni ne scias, en kiun direkton politike iros Nepalo.

Intertempe Usono volas, ke Dalai

Lama kaj lia sekvantaro kontraŭu la influon de Ĉinio en la regiono – Ĉinio tamen ne multe interesiĝas pri la malgranda Nepalo. Ankaŭ Barato volas en Nepalo ludi rolon.

Verdire la barata ambasadejo en Nepalo agas kvazaŭ plia ministrejo nepala. Cetere Barato subtenas novajn elektojn en Nepalo.

En diversajn direktojn estas tiel tirata Nepalo.

Navin SHRESTHA/PG

RUSIO

Bridi la monstron

Nov-Moskvo: nova urbo ekster nuna Moskvo por ministrejoj kaj aliaj ŝtataj institucioj. Tion anoncis antaŭ nelonge la rusa ŝtatestro Dmitrij Medvedev.

La ideon oni komencis prilabori antaŭ dek jaroj. Fine oni subskribis interkonsenton, tamen la preciza loko ankoraŭ ne estas fiksita. Fakte estas proponataj ok ebloj, kaj do Nov-Moskvo restas pli ideo ol realo.

Proponata estas satelita urbo enhavanta diversajn registarajn instancojn kun malpli da oficistoj ol nun. Ministrejoj en Moskvo estos venditaj, kaj la gazetaro jam priparolas, kiom da mono estos dume ŝtelata.

Klopodoj

Homoj, pensantaj pri la interesoj de la ŝtato, opinias, ke estos bone kunigi

oficistojn. Verŝajne tio tamen ne okazos. Malgraŭ registaraj klopodoj malpliigi la nombron de ŝtatooficistoj, ĝi kreskas.

Krome nek la prezidanto nek la ĉefministro anoncis sian translokiĝon en Nov-Moskvon.

La ideo konstrui novan urbon fontas el tio, ke dum la lastaj 20 jaroj Moskvo fariĝis monstra superurbo. Ĝi estas la administra, financa, kultura kaj kleriga ĉefurbo de Rusio. Pro tio ĝi estas dense loĝata: 11,5 milionoj da homoj tie rezidas.

Ĝangalo

La urbego suferas pro grandaj trafikaj problemoj kaj malbona ekologio. Elhakataj estas arboj: ilian lokon okupas novaj konstruaĵoj. Neniigata estas la historio de la urbo, viŝata el popola memoro. Moskvo vivas sen iu ajn sci-



La rusa ŝtatestro Dmitrij Medvedev.

ence motivita plano, laŭ la leĝaro de la ĝangalo.

Moskvanoj malŝatas sian urbegon pro ĝiaj haoso kaj interpremo. Provincaj malŝatas ĝin pro ĝia monavido. Neniu parolas pri „nia ŝatata ĉefurbo”.

Grava problemoj konsistas en tio, ke en Moskvo loĝas ĉirkaŭ 10 % de la tutlanda loĝantaro, dum tie koncentriĝas 90 % de la monrimedoj. Mono malĉastigas, koruptas la urbon; ĝi estas uzata por duagrada, triagrada aferoj; sed la regionoj suferas pro manko de monrimedoj kaj ne povas evoluigi siajn industriojn, agrikulturon, infrastrukturon.

Provincoj

Pli radikala solvo ol Nov-Moskvo estus dissendi la ministrejojn en la provincojn. Kial sidas burokratoj de la ministrejo pri agrikulturo en Moskvo, kiam la agrikulturo mem koncentriĝas ekzemple en la altaĵoj kaj krasnodara regionoj? Se ĉiuj 18 ministrejoj situus en regionoj, tien enflus mono por ilin prosperigi.

Petro la Unua, kiam problemoj pri Moskvo lin enuigis, simple konstruigis novan ĉefurbon, kiu poste fariĝis perlo de la monda kulturo. La nunaj reformoj procedas pli modeste.

Verŝajne estos organizita internacia konkurso por desegni la novan urbon. Konkurso ebligis publikajn diskutojn kaj partoprenigos moskvanojn. Se ne, la burokratoj ĉion decidis malantaŭ la kulisoj: bone por si, malbone por la urbo.

Mihail KOROTKOV



Moskvo estas dense loĝata: 11,5 milionoj da homoj tie rezidas.

Forpasas „granda eŭropano”

En Vieno estas enterigita Otto von Habsburg, la plej aĝa filo de la lasta imperiestro de Aŭstrio-Hungario Karl la 1a. Li forpasis la 4an de julio en Pöcking (Germanio) en aĝo de 98 jaroj.

Post pompa ceremonio li estis enterigita en la familia kripto, en kiu kuŝas liaj antaŭuloj, kiuj regadis la monarkion Aŭstrio-Hungario dum preskaŭ 650 jaroj. Apud li oni enterigis lian edzinon Regina, kiu forpasis la antaŭan jaron.

La enterigan ceremonion ĉeestis reprezentantoj de eŭropaj reĝofamilioj, kaj ankaŭ politikaj gvidantoj de diversaj landoj, multaj el kiuj antaŭe apartenis al la monarkio Aŭstrio-Hungario.

Abatejo

Miloj da homoj venis adiaŭi la forpasinton, kies ĉerko estis elmetata en la viena preĝejo *Kapuzinerkirche*. La koron de la forpasinto oni entombigis en Hungario, en la abatejo Pannonhalma.

Iuj aŭstroj plendis pri la pompo kaj honorsalutoj, akompanantaj la enterigon de tiu ĉi lasta kronprinco de la dinastio Habsburg, argumentante, ke tio ne konvenas en respubliko kiel Aŭstrio.

Otto von Habsburg dediĉis sian vivon al la batalo por unueca Eŭropo kaj estis dum 20 jaroj (1979-1999) deputito en la Eŭropa Parlamento, el la germana Kristan-Sociala Unuiĝo.

Pikniko

En 1989 li kunorganizis la piknikon de Tuteŭropa Unio, okaze de kiu oni malfermis la limon inter Hungario kaj Aŭstrio. Danke al tio ĉirkaŭ 600 ŝtatanoj de Germana Demokratia Respubliko (GDR) sukcesis fuĝi okcidenten.

Tiu ĉi evento helpis levi la tiel nomatan feran kurtenon. Post kelkaj monatoj

falis la berlina muro kaj okazis demokratiaj revolucioj en orienta Eŭropo.

Poste li obstine aspiris, por ke orienteŭropaj landoj aliĝu al Eŭropa Unio. La prezidanto de la Eŭropa Komisiono, José Manuel Barroso, nomis lin „granda eŭropano”.

Ekzilo

Otto von Habsburg naskiĝis en 1912, ses jarojn antaŭ la likvido de la monarkio Aŭstrio-Hungario fine de la unua mondmilito. En 1919 lia familio foriris en ekzilon, kaj multajn jarojn li loĝis for de Aŭstrio.

Li rezignis pri la trono en 1961 kaj post kvin jaroj oni permesis al li reveni al Aŭstrio – la unuan fojon post 1919. Li kritikis la nazian reĝimon en Germanio kaj kontraŭis en 1938 la aligon de Aŭstrio al la Tria Regno.

Evgeni GEORGIEV



Kiel deputito en la Eŭropa Parlamento, Otto von Habsburg ludis gravan rolon en la demokratiigo de orienta Eŭropo.



La enterigan ceremonion ĉeestis reprezentantoj de eŭropaj reĝofamilioj, kaj ankaŭ politikaj gvidantoj de diversaj landoj

NOV-ZELANDO

Tremoj teraj, financaj, politikaj

Eksplozoj, tertremoj, ekonomia krizo: katastrofoj, kiuj trafis Nov-Zelandon dum la lasta jaro.

En novembro pasintjare pereis 19 ministoj pro esplodo ĉe karbominejo ĉe Pike River, Sud-Insulo. La kialojn oni ankoraŭ esploras.

En septembro, pasintjare, kaj en februaro kaj junio ĉi-jare, okazis tertremoj sub la urbo Christchurch en Sud-Insulo. Dum tiu ĉi periodo okazis ankaŭ centoj da etaj tremoj.

Mortis pro la septembra tremo (laŭ Richter-skalo 7,1) du homoj; pro la februara (Richter 6,3) 181, kaj vunditaj estis 2000; kaj pro la du grandaj juniaj (Richter 5,5 kaj 6,0) estis vunditaj 46.

Koto

Venis savistoj el multaj landoj por helpi la lokajn skipojn. Dume, pro manko de elektro kaj akvo, miloj da homoj translokiĝis al aliaj urboj. Aparte ĝenis koto, kiu likis sur la tersurfaco kaj ofte eniris domojn. Okazis ankaŭ rokfaloj, kiuj kun la tertremoj kaj la koto damaĝis milojn da hejmoj.

Anoncis la registaro, ke en kelkaj distriktoj, la tiel nomataj ruĝaj zonoj, oni ne rekonstruos domojn, ĉar la tero tro malstabilas. Al tiuj, kiuj estas devigataj forlasi siajn hejmojn, la registaro pagos laŭ la valoro de la domo en la jaro 2007. Temas ĝis nun pri 5100 hejmoj.

En aliaj lokoj oni ankoraŭ esploras,

ĉu mal- aŭ re-konstrui. Intertempe kelkaj plendas, ke la sumoj promesitaj de la registaro ne sufiĉos por aĉeti novan hejmon.

Studentoj

Post ĉiu granda sismo okazis centoj da malgrandaj. Eĉ sufiĉe malgranda sismo vekas homojn dum la nokto, kaj tial oni ne sufiĉe dormas. Pro la granda nombro de viktimoj, oficialaj kaj karitataj servoj ne povis tuj respondi al petoj por helpi ripari domojn aŭ forigi koton. Feliĉe volontuloj, ekzemple studentoj kaj terkulturistoj, helpis.

Dungitoj en la ambulanco, fajra, polica servoj, kaj urbaj oficistoj, daŭre laboris, kiam foje ili mem spertis gravajn problemojn: domojn detruitajn aŭ difektitajn, aŭ parencojn mortigitajn pro falantaj konstruaĵoj.

La loka registaro provizis la plej difektitajn stratojn per porteblaj necesoj, kaj kelkloke ilin oni ankoraŭ uzas eĉ post naŭ monatoj. Multaj ankoraŭ atendas riparistojn, kiuj povas labori en ne urĝaj okazoj sen asekurista aprobo. Tamen la asekuristoj ne ĝustatempe respondas: pro tio multaj metiistoj alfrontas bankroton.

Ŝtelistoj

Domluantoj povis foriri al alia parto de la lando, kaj multaj tion faris. Tamen domposedantoj ne volas lasi siajn hejmojn, ĉar eble ili ne ricevos asekuran pagon kaj ili perdos la netan kapitalon de la domo. Krome ili timas, ke ŝtelistoj prirabos la domon. Rezulte, post tri grandaj sismaj eventoj, multaj homoj en la regiono de Christchurch suferas pro



En septembro, pasintjare, kaj en februaro kaj junio ĉi-jare, okazis tertremoj sub la urbo Christchurch en Sud-Insulo.

post-traŭmata streĉo.

La mortoj okazis plejparte en du konstruaĵoj en la centro de Christchurch. Multaj viktimoj estis studentoj el aziaj landoj. Evidente la du konstruaĵoj ne estis bone faritaj.

Kelkaj historiaj konstruaĵoj estas detruitaj kaj oni diskutas kiujn rekonstrui. Urbaj oficistoj vizitis Sanfranciskon por lerni el tieaj spertoj post la lasta granda tertremo.

Ekonomio

En la buĝeto de 2011 la registaro planas pruntepreni monon por pagi la rekonstruadon de Christchurch. Tial ĝi anticipas rekordan deficiton, sed esperas atingi pozitivan saldon en 2014-2015. Ĝi atendas, ke 170 000 novaj postenoj estos kreitaj kaj ke la ekonomio kreskos je 4 %. Multaj dubas pri tiuj taksoj.

La opozicia Laborista Partio diris, ke al la buĝeto mankas planoj por ripari la ekonomion. Intertempe, pro

ŝparrimadoj, malriĉuloj, studentoj k.a. ricevos malpli da mono. Multaj ŝtatoficistoj perdos sian postenon.

En 2010 la registaro ŝanĝis imposto-regulojn favore ĉefe al riĉuloj. Tiu ŝanĝo nun ŝajnas optimisma, ĉar mankas mono por pagi la rekonstruadon de Christchurch.

Alia problemo koncernas la kurzon, kiu kompare kun falanta usona dolaro restas alta. Tio, kun financa malstabileco en Eŭropo kaj aliloke, implikas eksportistojn.

Baloto

Intertempe ŝanĝiĝas neatendite la politika sceno. En marto Donald Brash [breŝ], eksa estro de la Nacia Partio, fariĝis membro kaj estro de la dekstra partio AKT. Tial la partio esperas pli da sukcesoj en la venonta parlamenta baloto. La ĉefministro, John Key [ĝon ki], diris, ke la baloto okazos la 26an de novembro, fine de la rugbea pokalo en Nov-Zelando. Li esperas, ke, okaze de venko fare de la gastiganta lando, homoj estos en bona humoro kaj voĉdonos por lia Nacia Partio.

Tamen problemoj ne malaperas. Pliiĝas vivokostoj, senlaboreco; 15 % de la infanoj vivas en familioj, kies enspezo estas malpli ol duono de la meza enspezo en Nov-Zelando; asekuristoj postulas pli grandajn pagojn por asekurado: rekonstrui la urbon Christchurch kaj ties ĉirkaŭaĵon multon kostos; kaj en aliaj partoj de la lando oni reripensas, kiel pretigi sin kontraŭ estontaj tertremoj.

D. E. ROGERS



La ĉefministro, John Key [ĝon ki], diris, ke la baloto okazos la 26an de novembro, fine de la rugbea pokalo en Nov-Zelando.

Ĝuu rabatitan kotizon!

En 2012 la kotizoj de Monato estos iom adaptitaj. Ĉiu tamen povas ankoraŭ ĝui la nunan tarifon, eĉ por la jaro 2012. Sufiĉas pagi vian kotizon por la jaro 2012 antaŭ la fino de novembro 2011 laŭ la malnova tarifo, kiun vi trovas en paĝo 4.

KOSOVO-TURKIO

Lernolibroj „ofendaj”

Mezaŭguste vizitis Makedonion kaj Kosovon la turka ministro pri edukado, Ömer Dinçer. Tiu postulis, ke lia kosova kolego, Rame Buja, intervenu, por ke en la lernolibroj pri historio oni „forviŝu ĉion ofendan kaj humiligan” rilate la turkan popolon.

Tuj leviĝis protestoj flanke de historiistoj. La ministro postulas, ili diris, ke oni ne plu konsideru otomanojn, antaŭulojn de hodiaŭaj turkoj, invadintoj kaj ekspluatintoj de la balkanaj kaj ceteraj popoloj dum 500 jaroj.

La historio, laŭ la fakuloj, ne povas ŝanĝiĝi. Krome ili asertis, ke nenio ofenda troviĝas en la lernolibroj en Kosovo.

Siaflanke la ministro Rame Buja promesis fari sian plejebulon por korekti ĉion korektindan en la lernolibroj, kaj eĉ pretis sendi delegacion al Turkio por „surloke kontroli la faktojn”.

Turkio havas vastajn ekonomiajn kaj politikajn rilatojn kun la balkanaj landoj. Sed verŝajne ĝi ankoraŭ revas pri la iama imperio otomana.

Bardhyl SELIMI



La turka ministro Ömer Dinçer postulas forigon de ĉio „ofenda” en lernolibroj.

NORVEGIO

Floroj, ne armiloj

Vendredon la 22an de julio skuis la kutime pacan Norvegon eksplodoj kaj mortigoj. Kio okazis kaj en la centro de Oslo kaj en la idilia insuleto Utøya? Raportas Douglas Draper.

Je 15:26 iuj oslanoj troviĝis en la urbocentro, aliaj kelkajn kilometrojn for, sed preskaŭ ĉiuj aŭdis la tondran eksplodon. Bonŝance estis feria tempo kaj vendrede posttagmeze. Tial nur kelkaj estis transirantaj la placon inter la registaraj domegoj aŭ laboris en ties teretaĝo. El tiuj ok mortis.

Tra la tuta lando ĉiuj enŝaltis radio-aparaton, vidis bildojn en interreto, legis raportojn, rigardadis televidon. Je 17:30 raportis ankaŭ pri pafado en Utøya – insulo, kie okazis la ĉiusomera junulara tendaro de la laborista (socialdemokrata) partio. Ĉu ia rilato inter la du atencoj? oni demandis sin.

Unue oni timis, ke temas pri venĝatako de terorista organizaĵo, pro la norvega partopreno en la militoj en Mez-Oriento. Fakte, pluraj tiaj grupiĝoj volis surprizi respondecon.

Norvega socio

Ĝis nun tia atako ne trafis Norvegon. Sed vespere klariĝis, ke ambaŭ atencojn fifariss sola unu homo, 32-jarulo el la burĝa okcidenta parto de Oslo. Do la atako ne venis de iu ekstera malamikaro sed el la norvega socio mem.

Sola li sisteme planadis la fiaferon dum naŭ jaroj, zorge registrante siajn preparojn en interreta „manifesto”, kiun li dissendis, malpli ol du horojn antaŭ la eksplodigo, al mil retroŝtaj adresoj en pli ol 30 landoj.

La atakoj estis direktataj kontraŭ la laborista partio, la plej granda partio en la reganta koalicio, kiun la fiulo konsi-

deras kunrespondeca pri la akceptado de enmigrantaj islamanoj, kaj pri subteno al la norvega multkultura socio.

Reĝa palaco

Li planis murdi ankaŭ la eksan ĉefministron, Gro Harlem Brundtland, kiu vizitis la surinsulan tendaron tiun saman tagon, sed li malfruiĝis pro la trafiko kaj ŝi estis jam for. Li planis ataki ankaŭ, li poste diris, la partian ĉefstabejon kaj la reĝan palacon.

Unuavide el la fotoj povis ŝajni, ke nur frakasigis fenestroj en la registaraj domoj kaj ĉirkaŭaj butikoj. Poste estis raportite, ke 2000 oficejoj estas tute ruinigitaj. Oni eĉ konsideras, ĉu mal-konstrui la ĉefan registaran domegon (17-etaĝan). Feliĉe tamen ĉiuj komputilaj arĥivoj saviĝis.

La ĉefa ingredienco de la bombo estis kemia sterko. Ankoraŭ plurajn tunojn trovis la polico poste en bieno, kiun luis la krimulo.

Urba biblioteko

La unuan tagon post la eksplodo la tuta urbocentro estis forfermita, ĉar oni ne sciis, ĉu komplikoj planas pliajn eksplodigojn. La registara kvartalo restos longe fermita. Ankaŭ la najbara urba biblioteko estos fermita tutan monaton pro riparoj.

Eĉ pli drameca estis la situacio en Utøya. Ĝi estas idilia arbara insulo, ĉ. 400 m x 300 m, en granda lago Tyrifjord, ĉ. 40 km nord-okcidente de Oslo. La fiulo alvenis vestita en falsa polica

uniformo, portante du pafilojn, malpezan kaj duonaŭtomatan.

Insula servisto trovis tion suspektinda kaj iris paroli kun gardisto. Ili estis la du unuaj viktimoj. Poste la ŝajnpolicano kunvokis la tendaranojn, pretekstante, ke li volas informi pri la atenco en Oslo. Tiam li komencis mortpafadi.

Tendarhelpantoj

Trankvile kaj sisteme dum pli ol horo li mortpafis, unu post la alia, 64 gejunulojn kaj kvin tendarhelpantojn. Kelkaj grupoj fuĝis al la strando kaj kaŝis sin, sed li postĉasis ilin kaj mortpafis plu, ankaŭ fornaĝantojn.

Multaj el la ĉirkaŭ 700 tendaranoj tamen sukcesis naĝi al la ĉeŝtero (600-700 m), sed la akvo havis nur 16 gradojn, sufiĉe por kaŭzi kramfon, kaj sekve unu persono dronis (tamen ne „glacie malvarma”, kiel skribis *Der Spiegel*).

Multajn savis lokaj turistoj per malgrandaj boatoj, sed la boatoj pleniĝis, ne povante preni ĉiujn naĝantojn. La teruritaj gejunuloj timis, ke estas pluraj pafantoj, kaj eĉ ne sciis, ĉu fidi la verajn policanojn, kiam tiuj finfine alvenis.

Lokaj elektoj

La rakontoj de la transvivantoj atestas pri koŝmaraj travivaĵoj kiel nur en milito. Inter la viktimoj estis junulaj delegitoj el ĉiuj landopartoj, kaj 15 el ili estis kandidatoj en la baldaŭaj lokaj elektoj.

La spontanea reago, de la gejunularo ĝis la registaro kaj de ĉiuj partioj kune:



RONELSE

Ni ne permesas al ni reagi per venĝemo, timo kaj malamo, sed defendos kaj plifirmigos nian malferman demokratian socion. Ni ne montru, ke ni estas pli fortaj, sed ke ni reprezentas ion pli bonan, komentis institutestro Jan Egeland.

En Oslo antaŭ la katedralo homoj metas florojn, kandelojn kaj dankmesaĝojn al la pereintoj, tiel amase, ke dum periodo la tramoj ne povis preterpasi. Rekordkvante vendiĝis floroj, ne armiloj por sindefendo. Resumis la etoson amikino de la trafitoj: Se unu homo povis esprimi tiom da malico, kiom da amo povas montri ni ĉiuj kune?

Memorceremonioj

Solenaj memorceremonioj okazis unue en Sundvollen, proksime al la insulo; dimanĉe plenpleniĝis la katedralo, lundon kolektiĝis 200 000 funebrantoj antaŭ la urbodomo, pli poste kunvenis eksterordinare la parlamento. Ĉiufoje ĉeestis la reĝa familio, ĉefministro Jens Stoltenberg kaj la partiestroj.

Kio motivis la fiulon? Samklasanoj ne rimarkis ion specialan pri li kiel junulo. Poste li membris kaj aktivis en la dekstrega Progresia Partio, sed mem ekŝiĝis antaŭ pluraj jaroj, ĉar li trovis ĝin tro modera.

Li aliĝis al la framasonaro kaj atingis

tie la trian gradon, ĝis oni tuj eksigis lin, sciiginte pri lia fifarego. Li aliĝis al Templokavaliroj, organizaĵo fondita en Anglio en 2002, konsiderante sin „krucmilitisto”.

Turka sieĝo

Lia manifesto estas anglalingva, 1500-paĝa, sed konsistas grandparte el citaĵoj de ekstremdekstraj ideologoj. Ĝi portas la titolon „2083”, la jaro de la 400a datreveno de la turka sieĝo de Vieno – ĉar la atenculo celis ekigi militon kontraŭ la amasa enmigrado de islamanoj en Eŭropon.

Li neniel pentis pro la krimego, kiun li poste karakterizas „malagrabla, sed necesa”. Li sentas sin vokita savi la kristanan kulturon kaj fieras, ke li faris la unuan paŝon por instigi eŭropan militon kontraŭ islamigo. Li konsideras sin konservativa aŭ ateista [tiel] kristano.

Lia celo estis defendi la kristanan Eŭropon. Li mem asertis, ke li kontaktis diversajn dekstremajn grupigojn precipe en Anglio, sed tiuj malkonfirmis tion kaj, same kiel la ideologoj, kiujn li citis el interreto en sia manifesto, definitive distancigis sin de liaj fiplanoj.

Ekstremdekstraj medioj

Tamen oni atentigas, ke nutris

lian idean evoluon lia studado de kontraŭislama literaturo kaj partoprenado en ekstremdekstraj medioj. Ĉu do iugrade oni rajtas kunkulpigi ilin pri la rezulto?

La tragedio havis kelkajn flankefikojn, eĉ favorajn. Pro la fakto, ke fiagis ne enmigrinto, sed etna norvego, enmigrintoj nun pli malferme rilatas al la norvega polico. En la multaj lokaj aranĝoj tra la lando plenakorde kunpartoprenis kristanoj, islamanoj kaj ali- aŭ nenikredantoj, kaj etnaj norvegoj nun pli neformale kontaktas enmigrintojn.

Plue, pluraj politikistoj plipopulariĝis pro siaj rektaj renkontoj kun la funebrantoj, kaj la unua enketo post la atencoj montris, ke la subteno de la laborista partio saltis de 30 al 41 %.

Ŝtata eklezio

Ankaŭ la ŝtata eklezio ŝajnas fortiĝi sian prestiĝon kiel nacia institucio sendepende de kredkonfeso, ĉar tra la lando oni malfermis la preĝejojn kaj homoj eniris kun sia funebro – jam en la tagoj antaŭ la oficialaj ceremonioj.

En la katedralo de Oslo kaj aliaj preĝejoj paroladis la ĉefministro, kvankam li ne estas religiano. Kaj oni komune kantis tre ŝatatan, inspiran poemon, tamen tute sekularan, „Al la junularo” de Nordahl Grieg – en la katedralo.

Flankefiko

Malfavora flankefiko estas, ke malgrandaj politikaj partioj, kiel la ekstremmaldekstra (Ruĝa) aŭ la ekologia (Verda), kaj malgrandaj organizaĵoj (kiel la Esperanta) devas strebi eĉ pli ol antaŭe por esti aŭdataj.

Sed antaŭ ĉio restas la granda demando: Ĉu la krimulo estas unika en la mondhistorio, kaj se ne, kio fareblas kaj farendas por eviti aperon de similuloj?

„Ĉi tio estas mondkatastrofo”, titolis alarmartikolo en norvega gazeto kelkajn tagojn antaŭ la atencoj. Ĝi aludis la milionhoman malsategon en Somalio. Poste, dum tuta semajno, la norvega gazetaro plene silentis pri Somalio kaj aliaj katastrofoj. Sufiĉis al ĝi unu.

Douglas DRAPER



En Oslo homoj metas florojn, kandelojn kaj dankmesaĝojn al la pereintoj, tiel amase, ke dum periodo la tramoj ne povis preterpasi.

Perspektivoj el rubujo



En la granddukejo Luksemburgo 97 % de la loĝantaro klasifike disigas siajn forĵetaĵojn. Ĝi estas do sufiĉe reciklema lando, kaj mia familio volonte adaptas sin al la ĉi-rilataj moroj.

Ni distingas kelkajn – feliĉe, tamen, ne dekojn da – specojn de forĵetaĵoj, kaj almenaŭ unufoje monate ni veturigas niajn malplenajn botelojn, plastajn skatolojn, kartonaĵojn ktp al la plej proksima reciklejo.

Tie avidaj faŭkoj de kolektuloj atendas ilin, en longa vico laŭ impresa hierarĥio, ekde „tondaĵoj el arbustoj” tra „neferaj metalaĵoj” ĝis „hejmaj eksaparatoj” kaj „uzitaj vestaĵoj”. Homoj el ĉiaj etnoj kaj sociaj tavoloj alveturas al

la reciklejo en aŭtoj foje luksaj, por vigle, preskaŭ konkurs-etose puŝi ĉaregojn da arbobranĉoj, eksfriduĵoj, kaj eĉ da revuoj, al la kolektuloj.

Kalocsay

Kiel bona esperantisto, mi ĉiam dediĉas apartan atenton al la ricevujoj de papero kaj kartono. Kiu scias, eble iun tagon mi trovos tie aŭtografajojn de Kalocsay, aŭ la Fundamenton ...?

Nu, tiaĵon mi ankoraŭ ne rikoltis, sed mi jam savis de re-muela sorto kultur-

historian kuirlibron de Oklahomo, usonan manlibron pri rapida maldikiĝo kaj eĉ pli usonan konsilaron pri eĉ pli rapida riĉiĝo.

Post tiaj antecedentoj, je lastatempe vizito kun mia bopatro, jam rutine mi elfiŝis el sub hundnutraĵa sako iun Michelin-vojmapon de Francio (kiu do bezonus tiaĵon en la epoko de GPS-navigiloj?) kaj okulfrappe malnovecan urbomapon de Luksemburgo.

Horon poste, en la hejma salono mi malfaldis miajn trovaĵojn, sub rigardo malaproba de mia bopatrino: kion ja faras elrubajo sur la manĝotablo?

Ekskurso

Michelin montriĝis kelkare eksdata landomapo pri Francio, kiun mia okjara filo tamen feliĉis kunporti al lerneja ekskurso, por okule sekvi la progreson de sia aŭtobuso.

Sed la alia mapo, german-titola *Bildstadtplan von Hermann Bollmann* („Bilda urbomapo de Hermann Bollmann”), pruviĝis io neordinara. Sur 58 oble 67 cm ĝi montras averse la urbocentron, dorse la pli vastan regionon, de Luksemburgo, kiaj ili estis antaŭ precize 50 jaroj.

La urbomapo estas „tridimensia”, en la senco, ke principe ĉiu konstruaĵo videblas sur ĝi kiel desegneto kun siaj detalaj pordoj, fenestroj, eĉ kornicoj, korbeloj kaj konzoloj. Ne mankas eĉ arboj kaj arbustaroj.

Kvadratkilometroj

Min fascinis vidi – sed pri tio nekonanto de Luksemburgo apenaŭ interesiĝos – la ŝanĝojn de la urba strukturo. En 1961 ankoraŭ preskaŭ ĉio koncentriĝis en la 50-hektara urbocentro, dum en 2011 pli konvenus diri, ke la samaj, kaj pliaj, aferoj troviĝas sur 50 ... kvadratkilometroj.

Efektive, la tuta areo de la ĉefurbeto estas 51,46 km². Antaŭ duona jarcento, ankoraŭ ne estis konstruita la grandioza ruĝa ponto (*Rout Bréck*), kiu ekde mia naskojaro, 1965, ligas la historian urbocentron kun Kierchbiere, la „Eŭropa Kvartalo”. Kaj en 1961 tiu kvartalo es-



PROF. MICHAEL STOLL

Parto de la mapo de Amsterdamo fare de Bollmann.

tis esence nur planata, kvankam ja tre ambicie.

Sed ni revenu al la mapo mem, kiu tiom impresis min, memorigante pri eleraĵoj de *Google Earth* kaj similaj nuntempaj retservoj. Nu, mi trovis, ke ekzistas la retejo *bollmann-bildkarten.de*, kiu rivelas familian entreprenon funkciantan en la germana urbo Bruns-viko (Braunschweig).

Desegno

Videble Hermann Bollmann (1911-1971) mapis multe pli ol nur Luksemburgon: ĉe la eldonejo mendeblas simile „tridimensia” mapo de pli ol 50 germanaj kaj 14 alilandaj urboj, de Aĥeno ĝis Wolfenbüttel kaj de Arhuso ĝis Zuriko. Konstateble temas ne nur pri historiaĵo, ĉar la mapoj de Frankfurto, Hanovro kaj Karslsruhe, laŭreklame „ekkestintaj el kraljona desegno”, datiĝas de la jaro 2010.

Sed kiel povas konkurenci tia arkaikaĵo kun ret-modernaj bildigoj de nia mondo? Nu, eble ĝuste, ĉar ĝi antaŭis sian epokon je duona jarcento.

Fosante en la reta arkivo de la germana semajngazeto *Der Spiegel*¹, mi trovis artikolon el 1964, kiu klarigas, kiel Hermann Bollmann, germana soldato dum la dua mondmilito ĉe la rusa fronto, devis dum la daŭraj retiriĝoj ĉiuvespere desegni novan mapon pri la pozicio de sia armeero.

Pejzaĝeroj

Bollmann rapide komprenis, ke averaĝa soldato ne facile orientiĝas laŭ tradicia mapo, kaj tial li riĉigis siajn mapojn per skiza bildigo de kiel eble plej multaj pejzaĝeroj, ekde arboj ĝis kabanjoj kaj artileriaĵoj.

Post reveno al sia hejmurbo Bruns-viko, li uzis la saman metodon por precize registri la gradon de konserviteco aŭ ruineco de ĉiu konstruaĵo en sia militsuferinta urbo. Preter atendo, lia mapo spertis komercan sukceson. Tra la 1950aj jaroj Bollmann do mapis per sama metodo Amsterdamon, Kolonjon kaj dudekon da pliaj urboj.

Por ĉiu mapo li restis semajnojn, foje

monatojn en la koncerna urbo, por precize, mane skizi ĉion en la preparfazo antaŭ fina map-pretigo. Ses monatojn li bezonis por verki sian plej grandiozan mapon, tiun de Novjorko, okaze de la mondekspozicio (1964).

Taksio

Laŭ la kresko de la vendoj, la ĝistiam meta metodo montriĝis tamen tro malrapida. Bollmann devis ion elpensi. En 1958 li aĉetis taksion de la marko Volkswagen, kaj muntis kameraon sur ties tegmento, kuplante ĝin al la distanc-mezurilo de la aŭto.

Tiel li povis, laŭ regulaj interdistancoj, prifoti tutan urbon mapotan. En la sama jaro li aĉetis aviadileton Cessna 170B, kiu ebligis „kovri” tutan urbon ene de 20 minutoj per 7-800 fotoj. Tiel jam facilis pretigi po 15 000 fotojn de la desegnotaj urboj (kaj 70 000 fotojn por Novjorko).

Guglo

Esence, Bollmann inventis, kvindekono da jaroj pli frue, la metodon „Google Street View”. La diferenco estas, ke la moderna „Stratvido” de Guglo

enretigas la rezulton de sia fotado, ebligante tridimensian ret-viziton al multaj anguloj de la mondo, dum la entrepreno Bollmann plu gardas la fotografiaĵojn en siaj ŝrankoj kaj publikigas nur la pape-ran rezulton.

La firmao Bollmann laboras nun pri Lepsiko, kaj planas realigi delongan revon: primapi la tuton de Berlino. Pli frue tio ne eblis pro la dividiteco de la urbo, kaj poste malinstigis la konstanta ŝanĝiĝado de la urba pejzaĝo.

Eble nun, en la 10aj jaroj de nova jarcento, venis la momento kupli pionire modernan teknikon al fascina metro-polo.

István Ertl

¹ Mirinde, kiel ĉiam pli faciligas la tasko de reta tempovojaĝanto. Ĉe *Der Spiegel* ŝajne eblas legi ĉiujn artikolojn en arkivo ekde 1947. En Islando, la retejo timarit.is arkivigas mirindan aron da fontoj, ekde kompleto de taggazetoj tra la 20a jarcento ĝis jarlibroj de fiŝista asocio. Lastatempe mi legis eseon, laŭ kiu baldaŭ eblas fari per la reto preskaŭ efektivajn tempovojaĝojn, pro la eblo kunmeti ĉiam pli da rete arkivita materialo kun ĉiam pli da teknikaj rimedoj vivigi ilin por reta promenanto.



Mapo de Novjorko fare de Bollmann

GREKIO

Malantaŭ la montrofenestro

La plimulto de la turistoj flugintaj al kaj el Grekio en la lasta jardeko trapasis la internacian „pordegon” de la lando. Temas pri la flughaveno *Eleftherios Venizelos* de Ateno, kiu ĉi-jare festis sian 10-jariĝon.

La malferma tago, en 2001, malbone aŭguris. Dum kelkaj horoj, okaze de la „ŝanĝo de la gvardio” inter la malnova kaj nova flughavenoj, Ateno estis la sola ĉefurbo en la mondo sen flughaveno. Kelkaj petis la demision de la tiama ĉefministro, Kostas Simitis, ĉar la flughaveno devus enkonduki novan transport-eraron.

Kliŝoj

Dum dek jaroj tamen la flughaveno

Venizelos konsistigas unu el la floroj ĉe la butontruo de la greka respubliko. Ĝi donas al vojaĝantoj bildon pri organizado, funkcikapablo kaj pureco, pri kiuj efektive la grekoj – spite al kliŝoj – estas kapablaj.

Oni pripensu ĉi-rilate la senman-kan organizon de la Olimpikoj en 2004 kaj de la festivalo *Eurovision* en 2006: kroma pruvo pri la laboremo de la greka popolo.

Eleftherios Venizelos ricevas ĝis hodiaŭ multajn laŭdojn. Tamen kio pri la malnova flughaveno *Ellinikò*? La ejo estas forlasita kaj neglektata. Do malantaŭ enviinda montrofenestro, Ateno kaŝas siajn ruinojn.

Roberto PIGRO

FERVOJOJ

Rapida kunligo


La registaro de la usona ŝtato Teksaso ricevis 15 milionojn da dolaroj por konstrui rapid-trajan fervojon, kiu kunligos la urbojn Dallas [dalas] kaj Houston [hjuston].

La fervojo ne nur mallongigos la vojaĝdaŭron inter tiuj du gravaj urboj (la 400-kilometra itinero daŭros nur 80 minutojn), sed ankaŭ kreos multajn novajn laborlokojn. La projekton oni jam komencis. Tamen ankoraŭ ne estas decidite, ĉu la fervojo kunligos la centrojn de la urboj aŭ iliajn flughavenojn. Ambaŭ proponoj havas siajn plusojn kaj minusojn.

AMik

VALUTOJ

Kupono-mono



Bankbiletoj spegulas la ekonomian kaj socian evoluon de Ukrainio.



En 1991, do antaŭ 20 jaroj, Sovetio dividiĝis en apartajn sendependajn ŝtatojn. Kun la apero de la novaj ŝtatoj aperis ankaŭ novaj valutoj: somoj, lidoj, latoj, hrivnoj ktp.

En Ukrainio dum tiuj 20 jaroj ŝanĝiĝis tri fojojn la valuto. Komence ĝis 1992 funkciis la sovetia valuto: ru-

blo. Sed al tiu necesis aldoni tiel nomatajn kartetojn de aĉetanto, do kuponojn. Tiam en la vendejoj estis preskaŭ nenio. Nur per rubloj plus kuponoj eblis aĉeti.

Diversvaloraj

Multaj civitanoj bone memoras, kiel kun la salajro oni ricevis foliojn (de formato A4) kun fortranĉeblaj diversvaloraĵoj kuponoj. Komence de 1992 aperis plurfoje uzeblaj kuponoj.

La tiama inflacio rapide „riĉigis” la ukrainojn. Tamen en 1996 eblis interŝanĝi la kuponojn kontraŭ nova ukraina valuto, hrivno: cent mil kuponoj egalas al unu hrivno.

Post 1996 hrivno trifoje ŝanĝis sian aspekton. Laŭ specialistoj, tio okazis por sekureco. Ne estas planataj pliaj ŝanĝoj.

Dmitrij CIBULEVSKI

Senrajtulaj sanrajtoj

En Danio, okaze de sanproblemoj, civitanoj kontaktas la kuraciston kaj ricevas helpon. Ili ne timas kromproblemojn, ĉar Danio estas ja riĉa lando.

Laŭ la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj: „Ĉiu havas rajton je vivnivelo adekvata por la sano kaj bonfarto de si mem kaj de sia familio, inkluzive de nutraĵo, vestaĵoj, loĝejo kaj medicina prizorgo kaj necesaj sociaj servoj, kaj la rajton je sekureco en okazo de senlaboreco, malsano, malkapablo, vidvineco, maljuneco aŭ alia perdo de la vivrimedoj pro cirkonstancoj ekster sia povo.”

Tamen en Danio loĝas 1000-5000 senrajtaj enmigrintoj. Okaze de malsaniĝo aŭ bezono de antaŭzorga

helpo ili ofte ne kontaktas kuracistojn, timante ekstradicion.

Ruĝa Kruco

Pro tio lastatempe Ruĝa Kruco, Kuracista Asocio kaj Dana Rifuĝa Helpo malfermis sanprizorgejon por senrajtaj enmigrantoj.

Klarigis la prezidantino de Ruĝa Kruco, Susanne Larsen: „Ni kunlaboras, ĉar ni jam spertas la bezonon de sanhelpo por homoj, kiuj pro diversaj kialoj senpermesite loĝas en Danio. Estas malaprobinde diskriminacii kontraŭ tiu celgrupo nur pro jura statuso.”

La nova kliniko estas 100 % private financata. Kuracistoj, flegistoj, akuŝistinoj, fizioterapiistoj kaj psikol-

ogoj senpage laboras. Ankaŭ konsultado kaj kuraciloj estas senpagaj.

Politikistoj

Protestis kelkaj politikistoj, kaj de la dekstra Dana Popolpartio kaj de la maldekstra Socialista Popolpartio. Opiniis membro de la Dana Popolpartio: „Post la kuracado oni ekstradiĉu ilin.”

Alia diris, ke li ne kritikos la policon, se tiu kaptos senrajtajn enmigrintojn kaj ilin ekstradiĉos. Tamen alia, atentigante, ke oni kuracas ekzemple krimulojn pafitajn, dubis, ĉu pro timo la senrajtuloj ja uzos la klinikon.

Ĉu tiu pravas, ĉu ne, daŭras akra debato pri la etiko de kliniko tia.

Betty CHATTERJEE

ARKEOLOGIO

Rubo de la romianoj

Multon da rubo la romianoj postlasis en Vindobona (nun la aŭstra ĉefurbo Vieno) dum la unua ĝis kvina jarcentoj.

Antaŭ la romia kastelo, parto de la limeso kontraŭ ĝermanoj loĝantaj norde de Danubo, troviĝis civilula urbo. Tie arkeologoj malkovris rubodeponejon el la tria jarcento. Tiaj restaĵoj spegulas la ĉiutagan vivon antaŭ 1700 jaroj.

Metalobjektojn kaj vitrajajn splitojn oni malofte trovis en la rubamaso. Pro la alta valoro de la materialo oni ilin fandis kaj reuzis.

Afriko

Ostoj de bovoj kaj ŝafoj fojfoje es-

tas rompitaĵoj por ekhavi la medolon. Figoj kaj daktiloj pruvas, ke oni importis nutraĵojn el foraj regionoj, eĉ el la norda Afriko.

Sed kvante la plej granda ruboparto estas diversaj ceramikaĵoj. Ankaŭ ili venas parte de malproksime, ekzemple de meza Francio kaj Italio. Temas pri teleroj, pelvoj kaj amforoj, kelkaj el *Terra Sigillata*, la plej luksa varo. Nur hazarde moneroj falis en la rubon.

Nun eblas vidi la romiajn restaĵojn ĉe ekspozicio, kiu daŭros ĝis la 15a de aprilo 2012. Detaloj ĉe la retpaĝo de Vieno-Muzeo: www.wienmuseum.at/de/standorte.html.

Walter KLAG



La Pagana Pordego, 50 km oriente de Vieno, estas la plej granda surtera romia konstruaĵo en Aŭstrio.

Eŭro daŭre allogas

La registaro de Litovio ofte deklaras, ke ĝi intencas enkonduki la eŭron ekde la jaro 2014. Analizante la aktualan ekonomian situacion, financistoj dubas, ke tio estas realisma.

Anstataŭ 2014 ili prefere indikas la postan jaron. Ilia opinio la registaran strebon ĝenos la buĝeta deficito, kiu pasintjare en Litovio atingis 7,1 % de la malneta enlanda produkto, la elmigrado kaj la junulara senlaboreco. Ekonomikistoj maltrankviliĝas pro la labora merkato de Litovio: samtempe kun granda senlaboreco estas daŭra manko de laborfortoj, precipe en la sektoroj de transporto, informteknologioj, teksaĵoj kaj nutraĵoj.

Inflacio

Spertuloj en 2012 atendas ĉirkaŭ kvarprocentan inflacion kaj diras, ke la kresko de la kostoj kaj manko de laborfortoj iom malhelpas la revigligon de la ekonomio post unu el la plej profundaj recesioj en Eŭropa Unio.

Lars Christensen, analizisto de la dana *Danske Bank*, aktiva ankaŭ en Litovio, rimarkigis ke Litovio kaj Latvio estas la solaj landoj, kiuj ankoraŭ parolas pri baldaŭa enkonduko de la eŭro. En Bulgario, Rumanio, Pollando kaj Hungario tiutemaj diskutoj jam antaŭlonge ĉesis. Li aldonis, ke aliĝi al la eŭrozono aŭ ne estas unualoke politika decido.

Tikla disciplino

La bankisto kredas, ke komunan eŭropan valuton Litovio povus havi jam post tri jaroj, tamen samtempe li substrekas, ke buĝeta disciplino kaj plenumo de la kriterioj de Maastricht estas tiklaj aferoj. „La jaro 2014 ankoraŭ estas realisma momento por ekfunkciigi la

eŭron en Litovio, se Litovio plenumos ĉiujn kriteriojn, sed mi ne estas certa, ĉu la eŭro estas preta por Litovio aŭ ajna alia lando. Vidu ekzemple Finnlandon, kie ni konstatas grandegan kontraŭstaron pro la leĝeranima financa helpo al Grekio. Ni vidas politikan malkontenton ankaŭ en Germanio kaj Nederlando. Tial estas malfacile imagi, ke tiuj landoj bonvenigos aliĝon al la eŭrozono de novaj anoj.”

Laŭ Christensen, inflacio ne estos pli granda obstaklo ol financa disciplino. „Mi ne havas timojn pri inflacio, ĉar kondiĉoj pri pruntado estas severaj kaj la proponado de mono ne kreskas tiel



Ĉu baldaŭ eŭro anstataŭ lido?

rapide”, diris la spertulo. Li prognozas, ke la kresko de la litova ekonomio ĉijare povas superi la antaŭvidatajn 4 % pro kresko de eksportado al najbaraj merkatoj. Tion favoras la fakto, ke la baltaj landoj estas najbaraj kun aktive renaskiĝantaj merkatoj de Skandinavio, Rusio, Germanio kaj Pollando.

LAST



Lars Christensen: Litovio kaj Latvio estas la solaj landoj, kiuj ankoraŭ parolas pri baldaŭa enkonduko de la eŭro.

Ĉu nukleaj centraloj necesas?

„La okazintaĵoj de Fukushima ja pruvis, ke la nukleaj centraloj povas rezisti al iu ajn natura akcidento, do ili estas la plej sekura maniero por produkti abundon da energio.” Tion diris Skender Koja, profesoro pri fiziko en la universitato de Tirano. Li opinias, ke nuklea energio anstataŭos la baldaŭ elĉerpotajn energifontojn surbaze de nafto kaj karbo, kaj ke ĝi estas tute pura kaj ne poluas la medion.

Landoj malsame reagas

Sub la premo de la forta verda partio, Germanio decidis fermi ĉiujn nukleajn centralojn ĝis la jaro 2022. Dume la registaroj de Usono, Ĉinio, Rusio kaj eĉ Japanio agas kontraŭe. Ili ne emas nuligi la programojn pri la disvolvado de nuklea energio. En Ĉinio ekzemple estas konstruataj pluraj elektrocentraloj.

Francio apenaŭ estas influata de la nuklea fobio. Ĝi certigas 75 ĝis 80 pro-

centojn de sia energio per nukleaj centraloj. Ĝi krome vendas sian troon da energio al najbaraj landoj, ekzemple Italio, kiuj mem malpermesas la konstruon de novaj centraloj.

Energifontoj ne sufiĉas

La tiel nomataj renovigeblaj energifontoj (vento, suno, akvo, verdaĵoj) hodiaŭ povas kovri nur malgrandan parton de la bezonoj. Tial la homaro, vole

nevole, eĉ se ĝi konfrontiĝas al nukleaj danĝeroj, estas devigata akcepti ilin. Cetere, ĉu la viktimoj pro produktado de nuklea energio ne estas malpli multaj ol tiuj pro trafiko aŭ en minejoj?

Najbaroj favoras

La albana registaro plurfoje sin deklaris preta konstrui nukleajn centralojn ĉe la bordo de la Lago de Shkoder, najbare al Montenegro. La investon je miliardoj da eŭroj realigus la itala ENEL aŭ la rusa Alfa Group Consortium. Same faris Slovakio, Slovenio kaj Bulgario, malgrandaj landoj kun pluraj nukleaj centraloj. Ili pliriĉiĝas per la eksporto de nuklea energio kaj ignoras la enlandajn kritikantojn, kiuj dubas je la kapablo de la ŝtato por bone mastrumi tiajn komplikajn entreprenojn.

Bardhyl SELIMI

INTERNACIAJ FINANCOJ

Magraj jaroj

Ŝtataj ŝuldoj estas altegaj

Ne nur malgrandaj landoj, sed ankaŭ la plej grandaj ekonomiaj potencoj suferas pro grandegaj ŝtataj ŝuldoj. En la eŭrozono la ŝtataj ŝuldoj mezume atingas 90 % de ĉio, kion la ekonomio produktas en unu jaro (la malneta enlanda produkto – MEP). La usona federala ŝuldo jam atingas 100 %, sed ĝi estas 120 %, se oni aldonas la ŝuldojn de la ŝtatoj. La ŝuldo de Ĉinio oficiale estas nur 20 %, sed fakuloj ne fidis la ĉinajn ciferojn kaj taksas ĝin je 80 % de la MEP.

Krome la plej granda ŝuldo de okcidentaj ŝtatoj estas nevidebla, ĉar ĝi konsistas el financotaj elspezoj por pensioj kaj por sanzorgaj servoj, kiuj ege altiĝos pro la maljuniĝo de la popolo. Se oni enkalkulas tiujn, oni atingas pluro-

blon. Belgio tial havas virtualan ŝuldon de 375 % de la MEP. Tiuj ciferoj donas impreson pri la monto superenda, se la ŝtatoj provos rimedi kontraŭ tio.

Eŭropo krome baraktas por solvi la eŭrokrizon. Por la subteno al Grekio, Irlando kaj Portugalio jam necesas 370 miliardoj da eŭroj kaj la problemoj tute ne finiĝis. Aldoniĝas la privataj ŝuldoj, precipe en landoj, kie pro troa optimismo troigitaj prezoj de nemoveblaĵoj subite falis. Usono tiom pli suferas pro multjara manio de kreditaĉetoj. La privataj ŝuldoj tie egalas al 260 % de la MEP.

Grandaj diferencoj

Se la ekonomio en Ĉinio daŭre kreskos, tio povos malaltigi ĝiajn ŝuldojn. Eŭropo kaj Usono ne aŭ ne plu havas la dinamismon por tiamaniere solvi sian problemon.

Feliĉe ekzistas landoj, kie la ŝtata kaso estas malriĉa, sed la civitanoj riĉaj. Tiel estas en pluraj eŭropaj landoj. Ekzemple en Belgio la havaĵo de ĉiuj ci-

vitanoj – eĉ sen la nemoveblaĵoj – estas 730 miliardoj da eŭroj, do pli ol la duoblo de la ŝtataj ŝuldoj.

Gravas ankaŭ, kiu financas la ŝuldojn: ju pli da mono oni prunteprenas eksterlande (ekzemple Grekio), des pli vundebla la ŝtato restas pro reagoj de la financaj merkatoj. Ŝtato, kiu havas ŝuldojn esprimatajn en ĝia propra valuto, kiel Usono, povas krompresigi monbiletojn. Tio identas al devaluto, sed la civitanoj ne tuj sentas la efikon.

Reveno al realo

La tutmonda financa krizo, en Eŭropo sekvata de la eŭrokrizo, akre montris la vundeblecon de la registaroj. La bonfarto kaj prospero en la plimulto de la ŝtatoj baziĝas sur iluzioj kaj troelspezado je kostoj de venontaj generacioj. Nur se la nuna krizo kondukos al pli realisma longdaŭra ekonomia politiko, la postaj generacioj povos esperi je pli stabila estonteco.

Ivo DURWAELE

Eŭropo en la fajro de la epidemio

Mia artikolo *Nova infekta malsano postulanta internacian kunlaboron* (Monato 2001/5, p. 17) (havebla interrete) priskribis malsanon, kaŭzitan de la enterohemoragiaj tipoj de intestaj bakterioj *Escherichia coli*. Tiu artikolo denove aktualas pro la ĉi-jara vasta epidemio de tiu malsano en Germanio kaj en multaj aliaj landoj de Eŭropo. Tial mi rememorigu iom pri la malsano kaj la kulpaj bakterioj.

Malsanoj kaŭzataj

La plejmulto de intestaj *E. coli* estas nepatogenaj aŭ eventuale kondiĉe patogenaj por homoj (t.e. ili provokas malsanojn precipe ĉe suĉinfanoj aŭ personoj kun imundifekto). Tamen ekzistas ankaŭ patogenaj tipoj, inkluzive de la tiel nomataj enterohemoragiaj tipoj. Ili produktas verotoksinon, substancon, kiu estas tre venena por la homa organismo.

La plej danĝeraj el tiaj bakterioj por la homoj estas *E. coli* „O157:H7”. Tamen estas „O104:H4”, kiu kaŭzas la nuntempan epidemion en Eŭropo. (La kodoj O kaj H indikas la specifajn antigenojn de la bakterioj.)

En gravaj kazoj ili provokas sangan lakson, anemion, malpligrandiĝon de trombocitoj kaj rezulte de tio malefikan sangokoaguliĝon. La plej danĝera komplikaĵo estas uremia sindromo (akuta rena nesufiĉeco).

La ĉefa rezervujo (fonto) de la infekto estas la kornobruoj. Kutime mikroboj vivas en la intestaro de bestoj kaj ne provokas malsanon. Tamen en besto malbone nutrata, malfortiĝinta aŭ alikaŭze malpli rezistema la bakterioj penetras en la sangon kaj infektas la tutan organismon. Tial viandaĵoj fariĝas infektitaj. Eblas ankaŭ al la bakterioj malpurigi laktaĵojn, akvon, salatojn, legomojn, sukajn ktp. Cetere, muŝoj povas disvastigi bakteriojn. Ankaŭ malsanaj

La plej danĝeraj el tiaj bakterioj por la homoj estas *E. coli* „O157:H7”.

homoj estas danĝeraj infektofontoj, kaj necesas al ili resti malkune de aliaj homoj ĝis resaniĝo.

La epidemio en Eŭropo

La malsanoj menciitaj supre estis registritaj en multaj landoj antaŭ kelkaj jaroj, sed plej ofte en Japanio kaj Usono. Nun la minaco atingis Eŭropon.

La informo pri la komenco de epidemio de danĝera intesta infekto en la nordaj regionoj de Germanio aperis fine de majo 2011. Sendube, jam estis iuj kazoj de la malsano pli frue. Tamen ĝis la 30a de majo estis registritaj en Germanio pli ol 1000 malsanuloj, el kiuj 10 mortis.

La epidemio rapide disvolviĝis. Jam la 3an de junio estis konataj pli ol 2000 kazoj kaj 18 mortoj. Kazoj de enterohemoragia intesta infekto aperis ankaŭ en naŭ aliaj eŭropaj landoj kaj ankaŭ sporade en Usono kaj Kanado.

La plej ofta kaŭzo de mortoj estis grava akuta rena nesufiĉeco. La kulpaj mikroboj estis rezistemaj al la plej konataj antibiotikoj. Nur senprokrasta sango-dializo povas savi multajn malsanulojn.



WIKIMEDIA

Por disponigi grandan kvanton de plasmido, multaj homoj en Germanio rapidis fariĝi sangondonantoj. En la interreto aperis informo, ke oni sukcese ekprovas la kuracilon *Soliris* (komerca nomo).

Komence germanaj specialistoj insistis, ke hispanaj kukumoj transmisias la bakteriojn al homoj. Estis detruitaj multaj tunoj da kukumoj, kaj tial hispanaj kamparanoj ege malprofitis. Tamen baldaŭ evidentiĝis, ke la kukumoj ne estis infektitaj. Hispanio juste postulis, ke Germanio kompensu la fincan perdon.

Ankaŭ diversaj aliaj legomoj estis fojfoje suspektataj. Finfine oni atentigis pri ĝermoj de sojo kaj aliaj faboj. Tamen ne eblas escepti kiel faktorojn de transmisio de bakterioj infektitajn viandaĵojn kaj laktaĵojn. Tial la instancoj admonas homojn zorgeme lavi legomojn kaj manojn, submeti viandaĵojn kaj laktaĵojn al altaj temperaturoj ktp. Ekde la dua de junio Rusio malpermesis importon de legomoj el Eŭropo dum almenaŭ unu monato.

Laŭ informo de la Monda Organizaĵo pri Sano, ĝis la 1a de julio 2011 la nombro de malsanuloj pro enterohemoragia intesta infekto en Germanio atingis 3900. El ili 800 suferas pro akuta rena nesufiĉeco kaj en multaj kazoj necesas transplantado de renoj. En 16 landoj, precipe en Eŭropo, estas registritaj pli

ol 4000 malsanuloj. Ĝis tiam mortis 50 malsanuloj, nome 48 en Germanio, 1 en Svedio kaj 1 en Usono. Fine de julio Germanio anoncis la finon de la epidemio.

Konkludo

Por ĉesigi tiun danĝeran epidemion kaj preventi la aperon de novaj similaj malsanoj necesas:

1. Malkovri la primaran fonton (rezervujon) de la malsano. Verŝajne tiu estas kornbrutaro, infektita de enterohemoragiaj tipoj de *E. coli*.

2. Determini vojojn kaj faktorojn de la transmisio de la infekto. Kiamaniere patogenaj mikroboj el la intestaro de bestoj trafis en legomojn? Probable temas pri bestaj fekaĵoj kiel malpurigiloj.

3. Klarigi la mekanismojn, per kiuj bakterioj *E. coli* en la intestaro fariĝas patogenaj kaj akiras rezistemon al antibiotikoj. Verŝajne mutacioj kaj aliaj genetikaj mekanismoj tre gravas.

Kiel mi jam skribis antaŭ dek jaroj, tre gravas konstantaj internaciaj reciproke informado kaj kunlaboro.

Vladimir LEMELEV

FIZIKO

Lumrapida komunikado

Grafeno estas nova materialo, kiu konsistas el ekstreme maldika tavolo da karbonmolekuloj, kiuj ariĝas en sesangula strukturo. Sciencistoj tre interesiĝas pri ĝi pro ĝiaj unikaj elektro- kaj lum-konduka ecoj. Ĝiaj malkovrintoj pasintjare ricevis la Nobelpremion pri fiziko.

Skipo ĉirkaŭ la fizikisto Han Zhang de la faka grupo Fotonica en la Universitato de Bruselo (*Université Libre de Bruxelles*) malkovris eĉ plian econ: grafeno povas polarizi lumon. La esploristoj asertas, ke pro tiu ĉi malkovro ĉiaj komunikadoj baldaŭ eblos pere de lumo. Ĉar nenio sur la

tero pli rapide moviĝas ol lumo, tio signifas ke la transigo de komunikoj ankaŭ ege plirapidiĝos. Krome, la kostoj de la necesa infrastrukturo estos multe malpli ol la nuntempaj.

Ivo DURWAELE



**Kontribuojn por la rubriko
Scienco de Monato
kunlaborantoj sendu al
scienco@monato.net.**



ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
#Prezo ĉe FEL: 24,00 € +
afranko (tradicia bindita
versio), 14,40 € (ePub aŭ
Mobipocket).

Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagy.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

La ultradimensio

Kiam finfine – post tiom da jaroj kaj kolosa elspezo – estis finkonstruita la instalaĵo de Barroca Colorada, ĝi iĝis la plej granda partikla akcelilo en la mondo. La teamo reciproke gratulis sin, kaj tuj procedis al la unua provo de la giganta instrumento, kiu okupis tunelon tra la tuta Montaro de Santa Fe kaj centojn da kilometroj sub la tero de la ĉirkaŭa ebenaĵo.

La unua provo malsukcesis. Du *peones* (laboristoj) estis mortigitaj pro difekto en la tunelo, kaj kolizio de la partikloj ne okazis. La dua provo havis tute neatenditan sekvon, pri kiu la publiko neniam sciis aŭ scios.

Post sukcesa kolizio, la konsternita teamo trovis sin, ne nur en nekonata loko, sed ankaŭ – kiel ili iom poste konstatis – en alia tempo. Laŭ iu neklarigebla fizika fenomeno, la eksperimento translokis ilin al alia dimensio aŭ paralela universo.

Unuavide, tiu „alternativa mondo”, al kiu ili estis transportitaj, ne tre malsimilis al ilia propra. Ne longe poste, tamen, ili konstatis, ke en tiu medio ŝajnis, ke la tuta historio kaj vivkondiĉoj, kiuj al ili estis konataj, suferis iun koŝmaran metamorfozon.

Priskribante sian sperton en la alternativa dimensio (por provi orienti sin kaj konservi sian mensan sanon), la anoj de la teamo ne ĉesis uzi la loknomojn, datojn kaj nomojn de gravaj personoj, al kiuj ili estis al kutimiĝintaj en sia propra dimensio, kvankam ili sciis, ke tio ne estas la reala situacio.

Laŭ la historio en tiu dimensio, dua mondmilito ja eksplodis en la responda jaro, sed, kontraŭe al la rezulto en nia konata mondo, la venkinta nacio estis la agresinta.

En la unuaj jaroj de la milito, la fortega kaj sperta armeo de la Gvidanto de la lando, kiun la teamo iom konfuzis nomis *Germanio**, fulmrapide invadis ĉiujn landojn de la okcidenta kaj meza eŭropa ĉeftero, krom *Svedio*. La lasta, kune kun *Francio*, *Iberio* kaj *Italio*, iĝis satelitaj nacioj de la Kvara Regno. Poste, la *balkanaj landoj* estis konkeritaj, kaj fariĝis ties kolonioj. Dum iom da tempo, la Gvidanto hezitis invadi la *Britajn Insulojn*, sed liaj spionoj informis, ke tiu lando troviĝas en ege malfortaj cirkonstancoj. Post la unua mondmilito, ĝi draste reduktis sian profesian armeon. Al novaj rekrutoj mankis sperto, trejnado kaj armiloj. Ĝia mararmea ŝiparo estis impona, sed malm moderna. Militaj aviadiloj estis malmultaj kaj malnovaj. Estis kreata civila milico, la tiel nomata „Loka defenda volontularo”, sed ĝi konsistis el junuloj, mezaĝuloj, kaj eĉ maljunaj viroj, kiuj devis trejniĝi uzante stangojn de balailoj, pro manko de pafiloj. La pafiloj de la propra armeo estis de la sama antikva modelo kiel tiuj, kiujn la britoj uzis dum la *afrika milito* kaj en la unua ultradimensia mondmilito.

Sekve la superaj oficiroj persvadis la Gvidanton ne perdi pli da tempo, sed tuj invadi ne nur la *Kanalinsulojn*, kiuj jam estis okupitaj, sed ankaŭ la tutan *Britan insularon*. La neŭtraleco de la Irlanda Libera Ŝtato, kaj tiu de *Svislando*, estis kelktempe respektataj de la Gvidanto. La *britoj* rezistis, sed estis venkitaj en ĉiuj teraj kaj aeraj bataloj. En la montaraj regionoj de *Kimrio kaj Skotlando*, bandoj da gerilistoj daŭre rezistis, kaj neniam estis tute ekstermitaj.

En la hejmlando kaj en la okupitaj teritorioj, okazis intensa persekutado de minoritatoj kaj skismanoj. La popoloj

de la ĝermanaj nacioj estis malpli severe traktataj ol la mezeŭropaj kaj balkanaj, kiuj multe suferis, ĝis interveno de *Granda Rusio*, kiam la traktado estis mildigita. Tamen, la Gvidanto ne aŭdacis invadi *Grandan Rusion*, kaj ne estis milito inter tiuj du grandaj potencoj.

La okupitaj *skandinavaj* landoj kaj *Britio* ĝuis iom pli da libereco ol la aliaj teritorioj. Iliaj lingvoj ne estis malpermesitaj, sed la okupantoj malestime rigardis ilin kiel nurajn ĝermanidajn dialektojn, kaj insistis, ke la *germana* estu la ĉefa lingvo de instruado kaj de administrado. Tion la angloj forte rezistis, sed post kiam ili konstatis, ke ili ne komprenas la klopodojn de la simplaj soldatoj (el kiuj multaj estis kamparanoj aŭ filoj de ordinaj laboristoj) komuniki en la *angla*, ili cedis, kaj komencis uzi kelkajn vortoj kaj frazojn en la idiomo de la okupantoj. La kaŭzo de la miskompreno devenis de la fakto, ke, kvankam la *angla* estis instruata kiel fremda lingvo en *germanaj* lernejoj, la tieaj instruistoj insistis, ke la lernejanoj ĉiam prononcu la *anglan* vokalon „a” kiel „e”, kio kaŭzis teruran miskomprenon. Tiele, la vorto *bad* (malbono, -a) prononciĝis kiel *bed* (lito); *man* (viro) kiel *men* (viroj); *fan* (ventumilo) kiel *fen* (marĉejo); kaj *sad* (malĝoja) kiel *sed* (t.e. „said”: diris). Samtempe, la *angloj* tiom malbone prononcis la *germanan*, ke dum longa tempo interkompreniĝo restis malfacila. Finfine, la juna generacio regis la lingvon de la okupantoj, kaj eĉ komencis preferi ĝin, sed por tio multe da tempo estis bezonata.

La Gvidanto, kies ŝatokupo estis arkitekturo, dumlonge ambiciis krei tute novan ĉefurbon kun vastaj placoj, larĝaj avenuoj, kaj kolosaj palacoj. Ĝia nomo estos *Teŭtonia*. Samtempe, li volis trans-

formi sian hejmurbon en pseŭdogrekan civiton. La planoj por tiuj projektoj jam estis faritaj.

Laŭ dekreto de la Gvidanto, multaj loknomoj en la okupitaj teritorioj estis *germanigitaj*. En Francio, *Lyon* iĝis *Loewen*, kaj *Marseille* iĝis *Marschallburg*. En *Anglio*, *Birmingham* iĝis *Bar-mendorf*, kaj *Manchester* estis ŝanĝita al *Menschenburg*. La germanaj nomoj estis reuzataj en lokoj, kie tiu lingvo iam estis parolata: *Bohemio*, *Sud-Tirol*, *Alzaco*, *Loreno* kaj tiel plu.

Aliflanke, por malfaciligi la vivon de la invadintoj, kaj por antaŭenigi la agadon de rezistantoj, pli kaj pli da homoj en regionoj, kie ekzistis lokaj etnaj lingvoj kaj dialektoj, decidis uzi nur sian idiomon en la ĉeesto de la malamikoj. Tio multe helpis revigligi lingvojn kiel la *keltaj*, la *eŭska* kaj la *soraba*.

La scienca teamo rememoris, ke en la mondo de ilia originala dimensio, grupo da germanaj oficiroj kaj civiluloj naŭziĝis pro la brutaleco de la Naziisma reĝimo, kaj faris komploton por mortigi la *Führer*. Iu kuraĝa oficiro, Grafo Claus von Stauffenberg, lasis en bunkro, kie la Diktatoro konferencis kun sia stabo, bombon kaŝitan en teko. La bombo eksplodis, sed la *Führer* eskapis. Kolonelo Stauffenberg estis punmortigita. Tamen, en la paralela universo, la Gvidanto fakte mortis, kaj nomumiĝis nova Gvidanto, iu admiralino de la regna floto. Dum iom da tempo, la ŝanĝo ne multe plibonigis la vivkondiĉojn de la okupitaj nacioj, sed iom malpeziĝis la subpremo kaj la persekutado. Malpli da homoj estis enkarcerigitaj kaj mortigitaj en laborkoncentrejoj.

Konstatante iom da mildigo en la sinteno de la *germanoj*, la registaro en *Moskvo* postulis, ke ĝiaj slavaj fratoj regajnu sian sendependecon. La nova Gvidanto unue rifuzis, sed liaj konsilantoj jam konstatis, ke la Kvara Regno estas nun tro vasta por esti efike administrata, do li malvolonte rezignis pri tiuj teritorioj. Tiu cedo multe malfortigis la pugnoforton de *Germanio* en la ceteraj okupitaj landoj.

Ĝi retiris la plimulton de siaj trupoj el tiuj teritorioj, lasante nur nominalajn garnizonojn „por defendi la pacon”.

Intertempe, la popoloj en la invaditaj landoj alkutimiĝis al la kondiĉoj sub la regado de la *germanoj*. La kapablaj germanoj ja provizis ilin per bona sanservo, elstara transportsistemo, puraj urboj, kaj – finfine – kvazaŭa aŭtonomio.

Nur en la kamparaj regionoj estis ankoraŭ venĝemo kaj rankoro kontraŭ la invadintoj.

En la urboj la influo de la *germana lingvo* estis ĉie evidenta. Multaj *germanaj* vortoj estis enkondukitaj en la lokajn lingvojn. Butikoj, magazenoj, publikaj domoj, hoteloj, restoracioj ktp portis nomojn kaj reklamojn en la *germana* aŭ en iom absurda lingva miksaĵo. Ekzemple, en *Anglio* vidiĝis „Kneipe-Pub”, „Gesundheitness”, „Imbiss-Fastfood”, „Chips-und-mehr” ktp. Inter la junuloj furoris *germana* slango, kaj ĉiuj volis porti germanajn *Mützen* (ĉapojn), *Hosen* (pantalonojn) ktp. Ili volis kanti nur popularajn *germanajn* kantojn. Eĉ kiam ili kantis en siaj lingvoj, ili emis imiti *germanan* akĉenton. La manieroj kaj kutimoj iĝis pli kaj pli germanaj.

Kun iom da surprizo, la scienca teamo konstatis, ke, kvankam la socio de la neŭtrala Usono ja ekzistis en la ultradimensio, ili povas observi absolute neniun influon de tiu parto de la mondo. Plie, ĝi ludis neniun rolon en la internacia politiko.

Bedaŭrinde la teamo trovis, ke ili ne plu kapablas toleri la vivon en la ultradimensio, nek la penson, ke ili neniam povos reiri al sia propra universo. Du el ili freneziĝis; la tria mortigis sin glutante cianidan acidon, kiu en ilia patrino lingvo nomiĝas *prusa acido*.

Postvorto: La partikla akcelilo neniam plu estis uzata.

Albisturo KVINKE

* La nomoj kursive presitaj ne prezentas landojn aŭ personajn nomojn ekzistantajn en nia dimensio, sed respondajn en la ultradimensio. La scienca teamo nomis ilin laŭ la nomoj al ili konataj en sia universo.




La Origino de Specioj

Karolo Darvino

Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko. La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio. Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, *La Origino de Specioj* restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
www.retbuto.net
retbutiko@fel.esperanto.be
 Prezo ĉe FEL: 24 € + afanko (papera versio),
 14,40 € (ePub, Mobi, PDF)

Kristanisma pia libreto



Ĉi tiu estas tre malgranda libreto, bele presita sur glacea papero kaj kun bunta bildokovropaĝo. Ĝia mesaĝo estas, ke ni memoru la eternan paradoksan signifon de Kristnasko, por ĉiu individua persono.

Kaj la paradokso? „Tio, kio okazis en tiu fora nokto, / havas enorman kaj esencan signifon / por ĉiuj miaj venontaj tagoj. / Paradokse.”

Donald BROADRIBB

Max Kaŝparŭ: *Kristnaskaj demandoj kaj paradoksoj*. Tr. Marek Blahuš. Eld. Kava-Pech, Dobřichovice. 18 paĝetoj vinktitaj. ISBN 978-80-87169-19-3.

Prezo ĉe FEL: 1,74 eŭroj + afranko

MONATO en Facebook

Kiu anas en la socia retservo Facebook povas senpage ricevi mallongajn informojn pri MONATO. Sufiĉas iri al la adreso eo-eo.facebook.com/revuo. MONATO kaj alklaki supre la ligilon *Ŝati*.

La mesaĝoj de MONATO ekde tiam aperos en via novaĵlisto.

Pri lingvo ne universala, ne el Krotelo, ne por Barato kaj nepre sen iksoj

La dulingva, tri-kaj-duone-paĝa atakema ĉerpilodaĵo: *Esperanto: lingvo universala? aŭ lingvo internacia?* – titole kun unu demandosigno tro – envicigas kelkajn aferojn, kiujn la aŭtoro ege malŝatas. Unue, la epiteton „universala”, kiu rilate lingvojn ĉiam entenas la koncepton de trudemo – forigema al ĉiuj aliaj lingvoj, kaj samtempe, ankaŭ al ties kulturoj. Li komparas „universala” kaj „internacia”, koncepton entenantan la ideon de „nur laŭ neceso helpanta”, do rilate lingvojn, internacia komunikilo inter la nacioj kaj ne iu nova ĉiea lingvo de ĉiuj nacioj.

La historian aplikon de la esprimoj „lingvo universala” kaj „lingvo internacia” la aŭtoro sufiĉe amplekse dokumentas. De la volapuka „*valempük*” ĝis la zamenhofska pra-esperanta „*lingwe uniwersale*” al la nuna same zamenhofska kaj laŭ la aŭtoro nepre preferinda „*lingvo internacia*” ĝis la post-esperanta ida „*linguo internaciona*”. Ĉe tio SAT ricevas kelkajn batojn sur la nazon.

Nun iel algluiĝinte al la termino „internacia”, la aŭtoro decidas, ke esperantigitaj francaj urbaj nomoj tute ne estas internaciaj – ekzemple, „*Le Crottoy*” ege ne iĝu „Krotelo”. Kaj entute, kio pri „*Villedieu-les-Poêles*”? Ĉu „Vildieŭlepŭalo” aŭ „Urbodio-la-hejtuloj”? Ho! Kiom profunde ĉagrenis tiu akra malŝato la bedaŭrindan recenzanton, kiu, tute hazarde, jam entuziasme esperantigis ĉiujn vilaĝnomojn de sia pli proksima ĉirkaŭaĵo!

Post tio la aŭtoro rajdas atakon kontraŭ la landan nomon „Barato” – aprobitan de la „Kakademio”. La internacie ekkonebla nomo estas – kaj estu nur – la zamenhofska „Hindio”. Laŭ

la recenzanto, tamen, temu ĉi-okaze pli supozeble pri „Hindujo”, kaj aldone la radiko „hind-” neniam ajn estis vere internacia. Internacia estas la senhoa „ind-”, kaj tute ne „hind-”. Fakte „hind-”, laŭ la recenzula opinio, dereliĝas. Sed evidente, la aŭtoro pravas pri „Barato”. Tiun konas vere neniu krom la baratanoj mem.

La kulminan mortpekon kontraŭ internacieco la aŭtoro kredas trovi ĉe ni rilate la uzon de jena surogata alfabeto kun la aĉaĵo „x”. Oni prefere uzu la zamenhofan belajon „h”, kiu liveras internacie pli ekkoneblan ortografion. Sendube, vera aserto. Sed en la unikoda epoko ankoraŭ plendi pri iksoj iomete „ex-modiĝas”.

Tiu ĉi pamfleto prezentiĝas en Esperanto kaj paralele en la franca. La recenzanto vere ne scias, kial aldone en la franca, ĉar temas eksklude pri tipaj esperantistecaj batalkampoj, kiujn oni prefere prisekretu.

Ĉu leginda? Pro la kontrastigo de „universala” kontraŭ „internacia” eble, sed pro la aliaj temoj – malpli. Ĉiukaze, la atentigo pri la senpripensa uzo de la epiteto „universala” verdire iomete enpensis.

Memkompreneble, rilate la esperantigon de nomoj, la leganto prefere ne fidu eĉ nur solan vorton de recenzanto nomanta sin ...

PEJNO Simono

André Cherpillod: *Esperanto: lingvo universala? aŭ lingvo internacia?* – *L'Espéranto: langue universelle? ou langue internationale?* Dulingva: franca kaj Esperanto. Eld. La Blanchetière, Courgenard, Francio, 2010. 8 paĝoj, A5. Sen ISBN.

anoncetoj

La kalendaro "La Jaro 2012" jam aperis kaj estas mendebla ekde nun ĉe Monato, aŭ ĉe via kutima peranto. La prezojn vi trovas en p. 4, en la kadro "Tarifoj".

Vizitu Iperity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iperity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplerio. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

Trevor Steele



**Flugi kun
kakatuoj**

Trevor Steele



**Flugi
kun
kakatuoj**

FEL

Estas la lastaj jardekoj de la 19-a jarcento, kaj eŭropaj potencoj ŝajne nehaltigeble kolonias aliajn kontinentojn. En la brita kolonio Okcidenta Aŭstralio blankaj setlantoj ignoras la rajtojn de la aborigenoj, murdas aŭ forĉasas ilin de la tradicia teritorio, aŭ permesas al ili resti kaj servi kiel senpagajn laboristojn sur nove kreitaj bienoj.

Eldonjaro: 2010

Tradicia bindita versio: formato 135 x 205 mm, 256 paĝoj,

ISBN: 978-90-77066-46-1; prezo ĉe FEL: 16,50 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 8,00 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be